


EL POPOLA ĈINIO

中國新道

4

1998

ISSN 0032 - 4361




90 jaroj miraklo!

lom pri ĉinaj dialektoj

Ankaŭ pri la kutimo de Esperanto

Pri medicinaj manĝaĵoj



La blanka pagodo en luna nokto

Foto de LIUSIGONG

INTER NI

Iuj legantoj demandis: Ĉinio estas lando kun vasta teritorio kaj granda loĝantaro, ĉu ĝiaj loĝantoj parolas komunan lingvon aŭ diversajn lingvojn; ĉu ili bezonas interpretadon, kiam ili renkontiĝas? Jen interesa demando. Tamen antaŭe ni ne pritraktis tiun temon. Responde al la letero de brazila sano Ismael De Miranda E Silva, ni aperigis la artikolon "Iom pri ĉinaj dialektoj" ĉi-numere en la rubriko "Temo Proponita de Legantoj". Iuj legantoj ne klare scias pri dialektoj de Ĉinio, kvankam ili bone konas ĝian komunan parolan lingvon. Fakte en Ĉinio multaj parolas dialektojn, tamen kun helpo de tiu komuna parola lingvo ili povas libere interkomunikiĝi malgraŭ la ekzisto de diversaj dialektoj. Same okazas al ni esperan-

tistoj: ni parolas la internacian lingvon, kaj ni ĉiuj havas ankaŭ propran gepatran lingvon.

Ĉinoj respektas la ekziston de tiuj dialektoj. Televid- kaj radio-stacioj de loka kaj ŝtata niveloj havas programerojn en dialektoj. Kvankam oni uzas multajn dialektojn, tamen ne okazas konfuziĝo, ĉar ĉinoj rigardas lernadon de han-lingvo tre grava.

Ni publikigis en tiu ĉi numero la artikolon "Ankaŭ pri la kutimo de Esperanto". Tio estas diskuto pri lingvaj problemoj. Pro limigo de paĝoj ni aperigis parton de la tekstoj. Ni petas komprenon de la aŭtoroj. Ni kredas, ke se ni diskutas sincere, serioze, atente kaj egalrajte, ni certe atingos komunan konon pri iuj problemoj de nia lingvo.

La Red.

El Popola Ĉinio

ENHANO

- | | |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| <p>2 INTER NI
 4 90 jaroj: miraklo!
 5 Ankaŭ pri la kutimo de Esperanto
 8 Sportoj en mezlernejo
 10 Ĉu la homaro naskiĝis en Azio?
 12 EKONOMIE:
 Kokosarba grupo-kompanio en disvolviĝo; Nova vojo por transporti karbon de norde suden; Kurantaj aferoj
 14 lom pri ĉinaj dialektoj
 15 KORESPONDI DEZIRAS
 16 ĈINAJ E-ISTOJ:
 Romantikeco kaj praktikemo de Licius
 18 Pupo-skulptisto Xu Zhuchu
 20 ORIGINALE VERKITAJ:
 Floraj amkantoj (Stornelo)
 21 HOMARO KAJ NATURO:
 Floroj sur montoj ornamas nian vivon
 24 Huashan-monto en miaj okuloj
 25 Tibet-nacianoj en okcidenta Sichuan</p> | <p>28 LAŬ LA SILKA VOJO:
 Mistera regno Loulan
 36 MULTNACIA ĈINIO:
 Ĝinooj — nacio trans jarmilo
 38 JUNULARO:
 Liberaj fraŭloj
 40 POR KOMENCANTOJ:
 Hundeto Ade (Fabelo)
 41 ESP-NOVAĴOJ
 42 SUR NIA LIBROBRETO:
 Du novaj libroj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo
 43 Fondinto de instituto por kripluloj
 44 EL ĈINAJ GAZETOJ
 46 Lernejestrino Han Yuling
 48 Filino de la tero
 50 Pri medicinaj manĝaĵoj
 51 ĈINAJ POŝTMARKOJ:
 Longmen-ŝtonkavernaro
 2 La blanka pagodo en luna nokto
 SUR LA DORSKOVRILO:
 [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
 Suprenirantaj ombroj; Sen titolo</p> |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

EL POPOLA ĈINIO



Alilandaj turistoj en mjaŭ-a vilaĝo

Foto de Wang Xinmin


Ĉinio havas multajn naciminoritatojn, ĉiu kun propraj moroj kaj kulturo. Iuj el ili regalas gastojn per buterteo kaj aliaj per vino, sed mjaŭ-aj virinoj preparas kolorigitan rizajon por siaj gastoj. La foto montras, ke alilandaj turistoj en mjaŭ-a vilaĝo ĝuas rizajon de diversaj koloroj.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
 Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Hou Zhiping
 Adreso: P.O.Kesto 77,
 Beijing 100037, Ĉinio
 Telefono kaj telefakso:
 +86-10-6832 1808



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|-----------------------------|-----------------------------|
| 1. Huanghua-haveno (p. 13) | 5. Ĝino-a Distrikto (p. 36) |
| 2. Interna Mongolio (p. 13) | 6. Zhengzhou (p. 43) |
| 3. Shaanxi (p. 13) | 7. Huashan-monto (p. 24) |
| 4. Wushan (p. 10) | |

90 jaroj: miraklo!

— Gratulo al la Universala Esperanto-Asocio

KIAM Esperanto eniras en sian 111-an jaron, la samideanoj en la tuta mondo kun granda ĝojo festas la 90-jariĝon de la Universala Esperanto-Asocio (UEA). Tio ja estas miraklo, ĝojiga miraklo de la homaro en la eksperimento pri la idealo en la kuranta jarcento kaj miraklo senprecedenca en la movado de artefaritaj lingvoj post la falo de la Babel-turo.

Post luktado en pli ol unu jarcento Esperanto majeste staras, frakasinte ignoradon, kontraŭstaron, atakojn kaj kalumniojn, superinte aliajn samtempajn projektojn de internacia lingvo kaj forpuŝinte la vanajn “reformojn” ene de nia komunumo. Esperanto estas triumfanto. Kun la triumfa krono kaj la nobla spirito donita de ĝia kreinto Zamenhof — amo al la homaro kaj amo al paco, ĝi eniros en la 21-an jarcenton pli terglobecan kaj pli informecan.

Kiel unu el la multaj faktoroj de la triumfo, UEA kaj ĝiaj talentaj estraroj en diversaj periodoj sendube ludis, ludas kaj lu-



La aŭtoro

dos gravan rolon. UEA iris ne ebenan, eĉ tre penigan vojon en la pasintaj 90 jaroj: ĝi travivis du mondmilitojn, masakrojn kaj etnajn pereojn; ĝi spertis nuntempan kruelan kulturalan detruon kaj la mondiskalan depresion; ĝi vidis la venkon de la 20-a jarcento, similan al tiu de la Pariza Komunumo, kaj la dismembriĝon de la grandega Sovetunio; ĝi vidis la aŭroron de orientaj revolucioj kaj la leviĝon de la Ĉina Popola Respubliko; ĝi spertis ankaŭ lokajn militojn tie aŭ ĉi tie kaj diversajn krizojn. Tamen ĝi

majeste staras. Ĝi eniros en la 21-an jarcenton kiel la unika triumfanto inter la organizoj de internacia lingvo. Al la venonta jarcento ĝi alportos ne nur la sukceson de la eksperimento pri internacia helpa lingvo kaj la delegitan reton, kiu etendiĝas al diversaj urboj kaj urbetoj de la tuta mondo kaj fondiĝis almenaŭ duonjarcenton pli frue ol la Interreto, kaj kies utileco klare videblas ene de la Esperantokomunumo, sed ankaŭ la plej altan idealon de la homaro pri paco, evoluo, progreso kaj feliĉo por ĉiuj homoj kun malsamaj lingvoj, malsamaj haŭtkoloroj kaj malsamaj kredoj, kulturoj kaj vivmanieroj. Tio estas idealo de grandaj prudentuloj antikvaj kaj nuntempaj, tio estas ankaŭ la senmorta idealo de Zamenhof.

Mi deziras, ke en siaj venontaj 90 jaroj UEA faru ankoraŭ pli grandajn kontribuojn al la nobla idealo de la homaro. ■

*Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA kaj honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

ANKAŬ PRI LA KUTIMO DE ESPERANTO

En la 9-a numero de nia revuo, 1997, ni publikigis la artikolon de akademiano Li Shijun "De 'fare de' al 'far'". Li proponas simpligon de prepoziciaĵoj kaj ĝeneralan uzon de infinitivo post prepozicioj kaj pritraktas la kutimon kaj evoluon de la internacia lingvo. Reage al la artikolo, nemalmultaj legantoj skribis al ni por diskuti pri tio. Krom jenaj samideanoj, konteston montris ankaŭ Malte Markheden (Svedio), Eva Hofmann (Germanio) kaj Odette Bernet (Francio). Pro paĝolimigo ni aperigas nur parton de la leteroj. Pardonon ni petas.

La Red.

Ludoviko De Doncker
(Belgio):



Propo-
no de Li
Shijun es-
tas ŝanĝo
de Funda-
mento kaj
spirito de
Esperanto.
Mi klopo-
dos ĉi tie
kontesti li-

ajn eldirojn.

Unue la pridiskutebla "far", mallongigo de "fare de". Ekzistis la dezirindeco ĉe la neceso trovi alian vorton anstataŭ la multsignifa "de" pro danĝero de miskompreno. Estis farataj multaj proponoj, sed ili ne taŭgis aŭ ne estis akcepteblaj; fine prezentiĝis "fare de", kiu havis sukceson. Malavantaĝe ĝi konsistas el du vortoj, el tri silaboj anstataŭ unu. Pro tio, "far" fine aperis kiel kontentiga anstataŭanto. Nu, tiu "far", funkciante ĉi tie kiel prepozicio, tamen fundamente estante verbo, estas evidenta peko kontraŭ tiu Fundamento, laŭ kiu ĉiu vorto kaj ĉiu vortelemento havas siajn proprajn neŝanĝeblajn signifon kaj funkcion.

Pro unu dezirinda kaj preskaŭ necesa akcepto al la regulo la lingvo ne riskas endanĝeriĝi; sed

ne estas permeseble, ke oni faru el tiu akcepto regulon, ĉar, kiel la artikolo de Li Shijun pravas, sekvas aliaj devioj kaj tio gvidos al fina ĥaoso.

Grandan nombron da verbradikoj li volas funkciigi kiel prepoziciojn: dank', depend', escept', kompar', koncern', rilat'. Krome sekvas adjektivoj: inkluziv', konform', proksim', kaj substantivoj: dank', flank', kontrast' kaj fine: spit'.

Laŭ Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV) "spit" estus fundamente prepozicio. Mi ege miras pri tiu aserto, ĉar nenie mi trovas aŭ renkontis ĝin en tiu funkcio.

Cetere mi devas rimarkigi ankaŭ, ke "koncerne" kaj "rilate", estante adverboj devene de transitivaj verboj, tute ne estas sekvataj de "al", aŭ de iu alia prepozicio. Oni do diras: "koncerne okazigon" kaj "rilate nasklimigon". Oni konstatas do, ke la plilongigo estas nur unu litero, kaj krome ĉu ili ne estas pli elegantaj, belsonaj kaj fluaĵ ol "koncern" kaj "rilat"? Plia rimarko: "kontraste kun" kaj "proksime de" (do ne "al").

Oni povas konsenti kun la aŭtoro pri la principo de neceso kaj sufiĉo. "Far" plenumas "neceson kaj sufiĉon", sed tute ne la aliaj ekzemploj: ili ne necesas,

kaj ne sufiĉas por klare esprimi la sintaksan rilaton. Ili impresas kiel strangaĵoj kaj ofendas la lingvosenton. Kaj mi ankoraŭfoje ripetas: "nenian sufiĉon", kiu perfidas la Fundamenton!

La rimarkon pri "per" mi ankaŭ renkontas en PIV. Mi ne komprenas! "Per" ne estas elizio de "pere de", sed kontraŭe: "per" estas fundamente prepozicio kaj "pere de" estas derivivo de "per", kaj ne inverse.

Koncerne la uzon de infinitivo post prepozicio (aŭ de prepozicio antaŭ infinitivo), tio estas precipe afero de lingvosento de eŭropanoj (almenaŭ mi tion supozas). Ne estas afero de privilegio ("rajto" skribas la aŭtoro) de kelkaj favoritaj prepozicioj. Tiel uzis ilin Zamenhof kaj centoj da eminentaj esperantistoj dum pli ol jarcento. Kial? Nur tial, ĉar ili sentis (sub nacia influo?), ke devas esti tiel! Eble pli spertaj gramatikistoj ol mi povus doni pri tio kialon; mi eĉ ne volas klopedi. Mi sole volas fari jenajn rimarkojn:

Pri "anstataŭ": uzate kun infinitivo, ĝi funkcias kiel subjunkcio, tute ne kiel prepozicio. Ekz.: anstataŭ babilo, laboro!

Pri "krom": En PIV mi trovas jenan ekzemplon: vi nenion povas fari krom kunbati viajn dentojn (denove kontraŭstarigo de du verboj). "Krom" estas ĉi tie sinoni-

mo de “ol” kaj “escepte de” kaj estas konjunkcio liganta du infinitivojn.

Pri “por”: ĝi ĝenerale indikas celon, kaj tiu celo povas esti ago esprimata per infinitivo. Ekz.: preni plumon por skribi. La senso estas “por ke oni skribu aŭ povu skribi”.

Do konklude en du kazoj temas nekontesteble pri konjunkcio.

Estas malkonvene deklari, ke okazas “rimarkinda tendenco en la evoluo de la uzado de la prepozicioj”! Kaj sekve estas ankoraŭ pli malkonvene voli “akceli tian evolucion favore al la kreskado de la lingvo”! Ne sufiĉas deklari, ke “mi mem volas malplaĉi al neni pro inklino al novismo aŭ reformismo”, kiam oni okulfrape celas “novigon kaj reformon”!

Alia deklaro estas tendenca: “la prepozicioj, same kiel la konjunkcioj, estas vortoj nevariaj (senfinaĵaj), tial la vorto ‘dum’ ne ricevas forman ŝanĝiĝon, kiam ĝi estas uzata jen kiel prepozicio jen kiel konjunkcio! Tamen tio ne validas por ‘antaŭ’ kaj ‘post’...”

Kial li ekzemple ne mencias “por”? Ĝi ne povas esti uzata sen aldono de “ke”, kiam ĝi funkcias kiel subjunkcio: “multe mankas, por ke li estu sukcesinta; subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki”. Ne eblas ĉi tie ellasi “ke”, por ke la frazo ne fariĝu kaduka aŭ eĉ ne komprenebla. Do ne eblas “proponita” gramatika regulo, ke “tiaj nevariaj vortetoj povas funkcii jen kiel prepozicioj jen kiel konjunkcioj aŭ subjunkcioj”. Tio ne eblas por ĉiuj!

La aŭtoro plie klopodas lanĉi novan prepozicion “pre”, ĉar Esperanto disponas pri vortoj kiel: predikato, prefaco, preferi, prefikso, preludo, premiso, prepari, prepozicio, prezidi k.a., kie li rigardas “pre” kiel praprefikson. Efektive la latina “prae” estas prefikso en multaj vortoj, memstare ĝi eĉ estas prepozicio kun signifo “antaŭ”, i.a., sed ankaŭ

“pro”. Multaj derivaĵoj kun “prae” (pre) eniris aliajn eŭropajn lingvojn, kie “pre” tute ne estas ankoraŭ sentata kiel prefikso, kaj tio certe ne estas la kazo en Esperanto.

Rob Moerbeek (Nederlando):



Permesu tamen kelkan kritikon kontraŭ la pens-instiga artikolo de la meritplena akademiisto Li Shijun, kies proponoj mia-opinie malfermus la pordon al troa libero. La principon “malderivi” jam vaste aplikis akademiisto Karolo Piĉ, kies “-al”-sufikson sekvis multe da novemuloj; ĉu nun ni atendu multajn tiajn “anti-”, “maksi-”, “mini-”, “omni-” prefiksojn, eble bonegajn por scienco, sed balastajn por la ĝenerala lernantaro? Saĝa ŝajnas al mi la sinteno de Zamenhof, ĉar ankaŭ li mem komence kreis troabundon da afiksoj: limigi la lernotan materialon.

Kaj se ni prenus kiel kriterion, ke, se la signifon garantias la kunteksto, ni ellasu la “necesajn” elementojn, ni forprenus al la lingvo la karakterizan ornamon, inkluzive de la akuzativo (utila por libera vortordo kaj por tuja klareco), kiel oni permesis en “Ido”.

Se ni uzus sen-restrikte ĉiajn prepoziciojn antaŭ infinitivo, povus okazi mis-aŭdaj problemoj inter “per-labori” (labor-gajni) kaj “per labori” (per laborado). Tio ĝuste estas la avantaĝo de Esperanto super naciaj lingvoj, kie ni ofte iom longe dubas pri la funkcio de vortoj en parolata frazo.

Ŝajnas al mi, ke Zamenhof pro tio ne enkondukis multajn elementojn finiĝantajn per pluraj konsonantoj aŭ eĉ unu plozivo, ĉar

ili kolizias kun vortkomencaj konsonantoj aŭ konsonantgrupoj: en pluraj lingvoj oni malforte prononcas ilin, kio ĝenus la aŭdon: escept, konflikt sciencoj: ĉu unu vorto? Kaj kiel aŭdiĝu la diferenco inter ili kaj nominativaj substantivoj kun elizio (spit).

La malmultaj funkcio-kombinoj (dum, ĝis; vi; ero, firmo...) taŭgigas Esperanton kiel ponton por instrui aŭ lerni naciajn lingvojn, en kiuj svarmas polisemio (multsignifeco) kaj homonimio (malsamsignifeco) de apartaj vortoj: ni ne multobligu ilin!

Vladislav Stepura (Ukrainio):



Oni povas konsenti kun lia aserto, ke “d a n k”, “koncern”, “konform” k.t.p. en liaj ekzemploj ne kaŭzas malklarecon. Tamen la frazoj ĉe tio fariĝis nur iomete mallongaj? Sed multe pli pezaj, multe malpli melodijaj.

Plie, anstataŭigo de “antaŭ ol” per “antaŭ” kaj de “post kiam” per “post” kaŭzas miskomprenon en la frazoj prezentitaj de Li Shijun kiel ekzemploj. Ĉe “antaŭ ol”: li antaŭe donis necesajn klarigojn, poste li komencis la manipuladojn. Se ni uzus simple “antaŭ”: li antaŭe komencis la manipuladojn, poste li donis necesajn klarigojn. Uzante la okazon, mi volas eldiri ankaŭ mian opinion (proponon) koncerne eblecon de mallongigo kaj simpligo de “laŭ mia opinio”. Ĝin oni povas anstataŭigi per la adverbo “mie”. Same “lie”, “ŝie”, “nie”, “ilie”. En tiu okazo ni ricevas efektive sufiĉe grandan mallongigon kaj simpligon.

Kaj laste, mie, ĉiu lingva propono devas esti analizita ĉiuflanke.

Vejdo (Ĉinio):



La elementa scio de lingvistiko diras, ke evoluo de lingvo ofte dependas de la kutimo de ĝiaj uzantoj. Esperanto,

nature, ne devas devii de la evolua trako de lingvoj. La aŭtoro uzas analogion por eltiri la konkludon, ke, ĉar “far” venas de “fare de”, ni povas elfari “dank” el “dank’ al”. Tio estas neracia rezonado. La regulo difinifa de la aŭtoro ankaŭ ne devus aplikiĝi al aliaj prepoziciaĵoj kiaj “koncerne al”, “konforme al”, “kontraste al”, “proksime al”, “rilate al” kaj “spite al”. Se permesite, ni povus funkciigi nudajn radikojn (koncern, konform, kontrast, proksim, rilat, spit k.s.) kiel prepoziciojn, kio

neeviteble kaŭzus grandan ĥaoson en uzado de vortoj.

Krome ekzistas ankaŭ alia grava problemo — belsoneco de elparolado de tiuj simpligitaj formoj. Ekzemple, oni ne povas facile prononci la lastajn du literojn de “koncern”, “konform”, “dekstr” (dekstre de), “rezult” (rezulte de) k.a. Efektive, la aŭtoro pledas por troa simpligo de formoj kaj ignoras la principon de sufiĉo.

Ĉu oni povas uzi infinitivon post prepozicio? Mi opinias, ke praktikantoj de nia lingvo devas sekvi la kutimon de uzado. Kvar prepozicioj (por, anstataŭ, krom kaj sen) toleras infinitivojn post si, tio tamen ne estas fakto. Evidente, “por” kaj “anstataŭ” (ankaŭ “krom” kaj “sen”) posedas duoblan funkcion. Kiam infinitivo staras malantaŭ ili, ili funkcias preskaŭ kiel konjunkcioj. Sed aliaj prepozicioj, “krom”, “dum” kaj “ĝis”, kiuj samtempe servas kiel subjunkcioj, ne havas tian funk-

cion. Do, kiam “por”, “anstataŭ”, “krom”, “sen” estas uzataj kiel puraj prepozicioj, ili, kompreneble, ne devus postuli infinitivon post si, sed aliookaze, ili tute rajtas postuli infinitivon.

En la artikolo la aŭtoro proponas, ke oni uzu “antaŭ” kaj “post” kiel subjunkciojn anstataŭ “antaŭ ol” kaj “post kiam”. Mi pensas, ke “antaŭ” kaj “post” posedas duoblan sencon, esprimante samtempe tempon kaj lokon.

Fakte, “antaŭ” kaj “post” ne povas servi kiel prepozicioj kaj subjunkcioj samtempe, ne simile al “dum”. Nur post kiam ni almetas “ol” aŭ “kiam” malantaŭ “antaŭ” aŭ “post” respektive, tiuj kombinaĵoj povas funkcii kiel subjunkcioj. Por klare esprimi la sencojn de tempo kaj loko, tiu almetado estas nepre necesa. La aŭtoro alvokas, ke oni uzu nudajn “antaŭ” kaj “post” sen distingo de tampa kaj loka sencoj, kio nur kaŭzus konfuzon de uzado.

Kunlaboro petata

Mi estas Wang Xue de la ĝardeno urbo Suzhou, Ĉinio. Mi laboras en la informadika fako de la Suzhou-a Kompanio de Komponentoj kaj Akcesoraĵoj de Konstru-strukturo. Mi amas Esperanton kaj esperas, ke ĝi servos al nia kompanio kiel ponto por internacia kunlaboro. Nia direktoro Zhu Jin forte subtenas min kaj petis, ke mi transdonu liajn bondezirojn al entreprenistoj de diversaj landoj. Estas bonvenaj interŝanĝo de informoj, traktado pri komerco kaj kuna utiligo de novaj teknikoj kaj ekspluato de novaj merkatoj.

Nia kompanio, kun areo de 120 mil kvadrataj metroj kaj fiksa kapitalo en valoro de ĉ. kvin milionoj da usonaj dolaroj, fondiĝis en 1958 kaj havas nun 182 administrantojn. Ĝi estas granda ŝtata konstru-entrepreno avangarde instalita kun bonkvalitaj projektado, fabrikado, konstruado kaj eksperimentado kiel unu tuto. En la pasintaj sinsekvaj jaroj ĝi estis honorita per la titolo “Plej Bona Konstru-entrepreno de Jiangsu”. En ĝi vendiĝas: Subportilo el ŝtaldrata reto, grandaj komponantoj el

betono, malpeza cementplato kun reto el ŝtalaj dratoj, kolore sandviĉita ŝtalplato, vitra plafono, vitra kurten-muro, elementoj el alumina alojo, malpezŝtala kilo kaj fajnaj ornamaĵoj. Nia kompanio havas sub si la Suzhou-an Fabrikon de Subportiloj el Ŝtaldrata Reto, Suzhou-an Fabrikon de Malpezŝtala Konstru-strukturo, Suzhou-an Fabrikon de Betonaj Komponentoj kaj Suzhou-an Fabrikon de Ornamaj Aluminaĵoj kaj Plastaĵoj. Ni havas ankaŭ kune investitan entreprenon Xinfu-a Limigita Kompanio de Komponentoj por Konstru-strukturo en la industria kvartalo de Suzhou.

Mi sincere petas kunlaboron, por ke nia lingvo Esperanto ludu pli gravan rolon en kampoj de ekonomio kaj komerco de la mondo.

Adreso: Wang Xue, Suzhou Construction Structural Components & Fittings Company, 74, Laodong Lu, Suzhou 215004, Jiangsu, Ĉinio

Telefono: +86-512-8626347 aŭ +86-512-8280824

Telefakso: +86-512-8285955

LI LIANG:



Sportoj en mezlernejo

VINTRE, post la 16-a subiras la suno. Tiam la sportejo de la Mezlernejo Dependenda de la Ĉina Popola Universitato en Pekino estas movoplena. Mezlernejanoj en diverskoloraj sportvestoj gaje ludas piedpilkon antaŭ golejo sur duonludkampo kaj sur la alia duono de la ludkampo iuj pli aĝaj knaboj sin ekzercas per ŝotado de malproksime. Ili ne estas tiel lertaj en ŝotado, sed tiuj, kiuj hazarde sukcesis, tuj montris sian montran fingron al la ĉielo. Ili ŝajne denaske scias fari tiun geston de piedpilko-stelo.

Tiu piedpilka ludkampo, kvankam ne kovrita per gazono, estis ramita el subtila tero. Ĝin ĉirkaŭas 400-metra kurejo. Sur cementaj sidlokoj por rigardantoj kelkaj legas libron. Pli fore estas latiso 4 m alta, najbare de ĝi

staras rekoj kaj paraleloj, kuŝas sablo-kavoj kaj ejoj por globoĵetado.

La nomita mezlernejo kun pli ol trimil lernantoj famas en Pekino ne nur pro bona instruado, sed ankaŭ pro eminenta sportado. La lernejoj teamoj de piedpilko, korbopilko, flugpilko, tabloteniso, atletiko k.a. plurfoje gajnis la ĉampionecon en konkursoj urbaj kaj distriktaj. La lernejo kulturis multajn elstarajn sport-lertulojn ne nur por altlernejoj, sed ankaŭ por teamoj de Pekino kaj Ĉinio.

Do, kiamaniere la lernejo faras sportan instruadon? Lasu sportajn instruistojn respondi la demandon.


Tang Jianmin estas direktoro de ĝia sporta sekcio, en kiu laboras dekkelkaj instruistoj.

“Pro tro da lernantoj mi devas zorgeme aranĝi lecionojn por ĉiuj klasoj,” diris instruisto Tang.

Malgraŭ ĉia malfacilo, oni devas garantii sportajn lecionojn, ĉar tion bezonas la lernantoj kaj lernejo, kaj krome, kvankam la poento de sporto ne okupas gravan lokon en la ekzameno por altlernejo, tamen sporto estas nemankigebla.

Tiukampe, la instruistoj de sporto de la nomita lernejo plene konfidas siajn lernantojn. Statistiko montras, ke 96% de la lernantoj povas atingi la ŝtatan normon. La instrua programo de la Eduka Komisiono de Ĉinio postulas, ke mezlernejanoj lernu en sportaj kursoj fundamentajn sciigojn pri sportoj, atletikon, uŝonon, pilkoludon, gimnastikon kaj dancojn. Antaŭ ĉio ili devas lerte fari rilatajn movojn.

“En la lernejo la lernantoj lernas plejparte racian abstraktan pensadon, kaj la percepto ekkonita nur post persona praktikado plej facile akireblas dum sportado.



En sportkunveno de la lernejo

Iasence oni povas diri, ke ni kulturis la kvaliton kaj personecon de niaj lernantoj.”

Ĉiutage la instruistoj faras klarigojn kaj persone prezentas kiel ekzemplon ĉiujn movojn, nerimarkite influante la lernantojn per racia koncepto en diversaj movoj. Por helpi siajn lernantojn venki timon en farado de malfacilaj kaj danĝeraj movoj, la instruisto kuraĝigis ilin: “Provu, bravuloj!” Inspirite de la instruisto, kelkaj kuraĝaj knaboj brave provis kelkajn fojojn kaj fine plenumis la movojn. Poste, la aliaj sekvis ilin. En la sekvanta leciono ĉiuj sukcesis. La instruisto opiniis: “Gravas, ke en la komenco ni kuraĝigas ilin kaj fine havigas al ili memfidon.”

Kompreneble, ne ĉiuj lernantoj povas kompreni sian instruiston. Ĝenerale ili faras laŭ sia plaĉo. Plejparto de ili preferas

pilkoludon al longdistanca kurado, globoĵetado, surreka sinlevado k.a. Eble kompetentaj instruistoj bone scias eksciti la intereson de la lernantoj: Komence la lernantoj kapneis, poste ili provis, fine ili povis.

Iu diketa knabo rakontis al mi sian travivaĵon: “Kiam mi unuafoje faris 400-metran kuradon, mi plenumis ĝin iom pli ol kvar minutojn, kaj multaj mokis pri mia dikeco. Sed la instruisto diris al mi: ‘Mi kredas, ke vi povos fini la kuradon en tri minutoj kaj duono.’ Li eĉ akompanis min en la kurado, kaj dank’ al lia kuraĝigo, post unu-monata ekzercado, finfine mi povis fini la 400-metran kuradon en tri minutoj kaj duono.”

Fakte, la lernantoj uzas meznombro unu horon por sportoj ĉiutage kaj havas tri sportajn lecionojn po 45 minutoj semajne. Krome, ili povas sin anonci al la lernejoj teamoj laŭ sia plaĉo. Kompreneble, ne ĉiuj povas aliĝi al la teamoj.

Pro tio, tiuj, kiuj havas feliĉon eniri en lernejan teamon, domaĝas la ŝancon kaj energie sin ekzercas por plej bonaj atingoj. Ekz., antaŭ duonjaro, invitive de meksikia piedpilka klubo, la lerneja teamo konsistanta el 18 knaboj flugis al Meksikio por lernado. Intertempe ĝi, kiel reprezentanto de la loka piedpilka klubo, gajnis subĉampionecon de la junula piedpilka konkurso de Meksikio.

Tamen, menciante tiujn senzorgajn lernantojn pli kaj pli dikiĝantajn, la instruistoj ĉaĝeniĝis:

“Hejme, ili ĉiuj estas solinfanoj kaj faras nenion, ĉar iliaj gepatroj pretigis al ili ĉion kun espero, ke ili akiros altajn poentojn en ekzamenoj.”

“Kion fari? Plej grave por ili estas plenumi la lernadon, ĉar la konkuro pli kaj pli intensiĝas.”

“Kompare kun la geknaboj de la 60-70-aj jaroj, la nunaj vivas pli komfortan vivon kaj havas pli bonan sanstaton. Kun multaj elektronaj ludiloj, neniu el ili mem faras lignan turbon, katapulton, feran rulringon... Malgraŭ, ke la nunaj geknaboj estas pli saĝaj kaj scias multe pri alta teknologio, mankas al ili io, eble ia origineco kaj intimeco kun la naturo. Pro tio ili ne bone scias kiel kunlabori kun aliaj.”

Probable, oni ne devas atribui tiun eraron al la nunaj geknaboj, ĉar ili plejparte ŝatas sportojn, sed mankas al ili sufiĉe da tempo pro tro peza ŝarĝo de la lernado. Estas grave, ke la lernejoj kaj iliaj gepatroj ne rigardu la lernantojn sportemajn kiel tiujn, kiuj ignoras sian propran devon.

Vesperiĝis. Iuj lernantoj daŭre energie ludis korbopilkon en la sportejo. Ili ĉiuj klopodis por venko. ■

Trejniĝo



Ĉu la homaro naskiĝis en Azio?

PRI la vivo de Wushan-homo, fama ĉina arkeologo prof. Huang Wanbo rakontas: “Antaŭ du milionoj da jaroj, kiam Yangzi-rivero ankoraŭ ne ekzistis, en Wushan estis arbaro, kun klimato humida kaj varmeta. Vivis bestoj de pli ol cent specoj kaj diligentaj homoj, kiuj vivtenis sin per primitivaj ĉasado kaj plukado.” Huang eltrovis fosilion de Wushan-homo, kiu estas la plej primitiva homo ĝis nun trovita en Azio. La eltrovo montras, ke la apero de ĉinoj pli fruis je ĉ. miliono da jaroj ol tiu indikita de la antaŭa konkludo. Ĝi ankaŭ malfermis novan vojon por studo pri primitivaj homoj.

STUDO PRI “DRAK-OSTO”

“Drak-osto” estas ĉina medikamento, kiu fakte estas fosilio de primitivaj mamuloj. Komence de la kuranta jarcento, en monto de Zhoukoudian, sudokcidente de Pekino, kamparanoj trovis en la kavernoj multajn ostfosiliojn. Ili nomas la monton “Monto de drak-osto”. Tio vekis atenton de paleoantropologoj, kaj ili komencis grandskalan prifosadon. Poste oni trovis tie fosilion de Pekin-homo, kio mirigis la tutan mondon. La eltrovo de Pekin-homo pli frugis la homan historion je kelkcent mil jaroj. La historio ripetiĝas — post kelkdek jaroj, en studo pri “drak-osto”,



S-ro Huang Wanbo

Huang Wanbo trovis fosilion de Wushan-homo. En la 20-aj jaroj, iu usona paleontologo esploris “drak-oston” en Wushan ĉe la Tri Gorĝoj, meza baseno de Yangzi-rivero. Li per alta prezo aĉetis multajn fosiliojn de mamuloj, elfositajn de lokaj kamparanoj. Lia studo vekis grandan eĥon en la internacia rondo kaj ankaŭ multe helpis la ĉinajn arkeologojn.

Somere de 1984, Huang gvidante ekspedicion pri la Tri Gorĝoj venis al la loko, kie la usona paleontologo aĉetis fosiliojn. Esplorinte la geologion kaj geomorfolo-

gion, li ekpensis: la fendego en Orienta Afriko estas rezulto de fortaj moviĝoj de terkrustaj platoj. Antropologoj trovis en la fundo de la fendego multe da fosilioj de homoj, kulturaj restaĵoj kaj fosilioj de mamuloj. Tio donis al ili esperon malkaŝi la sekreton de la naskiĝo de la homaro. Ankaŭ la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero estas rezulto de moviĝo de terkrustaj platoj. Ĉu ankaŭ la Tri Gorĝoj surprizos la esplorantojn pri deveno de la homaro same kiel la Fendego en Orienta Afriko?

En Wushan-gubernio de Sichuan-provinco, vilaĝa kuracisto diris al Huang kaj liaj kolegoj, ke kamparanoj elfosis milojn da kg da “drak-ostoj” el la monteto, kiun la lokanoj nomas “Monteto de Drak-osto”. Ili venis al la monteto, 830-metre super la mar-nivelo. Ĝi estas kovrita de densaj plantoj. Estas malfacile imagi, ke tie kuŝas restaĵoj de primitivaj homoj kaj aliaj mamuloj. Sed kiam ili alproksimiĝis, ili vidis ĉie pecojn de “drak-ostoj”. Huang tre eks-citiĝis. Unu, du, tri... post nelonge li trovis pli ol dek pecojn. La fosilioj apartenas al giganta simio, sabrodenta tigro, hieno kaj malgranda pando, kiuj estas ĉefaj bestoj vivantaj en suda Ĉinio en frua plejstoceno. La eltrovo donis ŝlosilon por malfermi la trezorejon de fosilioj de Wushan-homoj.

DENTO ANTAŬ DU MILIONOJ DA JAROJ

Aŭtune de 1985, arkeologia grupo komencis prifosadon en la Monteto de Drak-osto. Ili tre diligente kaj atenteme laboris — faris zorgemajn fosadon kaj elekton en ĉiuj tavoloj kaj en ĉiuj pecoj de tera kaj ŝtona tavoloj, kribris la terpecojn por ne preterlasi eĉ etan fosilion.

Iun tagon, dum klasado de fosilioj prof. Huang trovis pintan oston, kiu verŝajne estis prilaborita aŭ uzita de homoj. Tio montras, ke tie aktivis homoj. Li pli atenteme serĉis. Jen homa mandiblo kun du molaroj! Huang saltis de ĝojo. Fakuloj komparis la pintan oston kaj fosilion de mandiblo kun

aliaj fosilioj elfositaj en sama tavolo. Ili opiniis, ke evidente la pinta osto estis prilaborita, kaj ĝi apartenas al la homa kulturo pli antikva ol la ŝtonepoka kulturo; kaj la fosilio de la mandiblo diferencas de tiu de giganta simio probable estas la plej frua homa fosilio.


La sekvan aŭtunon ili refoje venis tien por fari pluan prifosadon. La 24-an de oktobro, ili trovis blankan denton kun brilo de emajlo. La incizivo tre similas al tiu de nuna homo. Poste oni konstatis, ke ĝi estas dento de primitiva homo. Post analizo de la Ĉina Akademio de Sciencoj, oni opiniis, ke ĝi apartenas al frua plejstoceno, antaŭ 2.04 milionoj da jaroj. Sciencistoj de Kanado kaj

Usono konstatis tion per plej avangarda rimedo.

ELTROVO GRAVA POR STUDO PRI EVOLUO DE LA HOMARO

La homaro naskiĝis antaŭ milionoj da jaroj. Multaj atingoj en studo pri la naskiĝo de la homaro aperis en Afriko. La internacia arkeologia rondo havas komunan opinion, ke la homaro naskiĝis en Afriko. La prahomoj en Azio venis de Afriko. De 1984 ĝis nun, prof. Huang trovis ne nur la homajn incizivon kaj mandiblon, sed ankaŭ dekojn da ŝtonaj iloj uzitaj de Wushan-homoj. Pli kaj pli da elfosaĵoj konfirmis la opinion, ke antaŭ du milionoj da jaroj, en Azio jam naskiĝis la prahomoj. Vidinte la atestojn, la internacia arkeologia rondo diris, ke tiu eltrovo eble ŝanĝos la teorion pri evoluo de la homaro. En la sama tavolo, kie oni trovis fosilion de Wushan-homo, estis trovitaj ankaŭ fosilioj de giganta simio kaj aliaj 116 specoj de mamuloj. Tio estas senprecedenca en la paleoantropologia prifosado de la mondo. La samtempe trovitaj fosilioj de giganta simio kaj Wushan-homo montras, ke antaŭ la formiĝo de Yangzi-rivero kaj ĝiaj Tri Gorĝoj, giganta simio kaj Wushan-homo jam kune vivis tie. Antaŭe iuj antropologoj opiniis, ke eble ankaŭ Azio estas naskiĝloko de la homaro, sed mankis al ili atesto — fosilioj de homoj antaŭ 2-4 milionoj da jaroj. Nun la eltrovo de Huang donis gravan pruvon.

Fama ĉina arkeologo Jia Lanpo opinias, ke la eltrovo en la Monteto de Drak-osto estas grava por studo pri evoluo de la homaro. En Afriko oni trovis fosilion de primitiva homo antaŭ 4.4 milionoj da jaroj. Ĉu ĉinaj sciencistoj trovos en sudokcidenta Ĉinio fosilion de primitiva homo antaŭ 2-4 milionoj da jaroj? La eltrovo de fosilio de Wushan-homo donis al ili esperon. ■



Kokosarba grupo-kompanio en disvolviĝo

de ZHENG ZHENJIE

LA Ĉina Trinkaja Asocio publikigis, ke el la 20 entreprenoj de trinkaĵo, kiuj enspezas plej multe en Ĉinio, la unua estas la Trinkaja Grupo-kompanio Jianlibao de Guangdong kaj la dua — la Kokosarba Grupo-kompanio de Hainan, kies produktokvanto en 1996 estis 200 mil tunoj, t.e., sesono de tiu de la naturaj trinkaĵoj en Ĉinio.

Hainan-provinco estas la plej granda produktobazo de tropikaj plantoj en Ĉinio. Tie tutjare bonodoras kokosoj, mangoj, ananasoj, longanoj (*Euphoria longan*) kaj bananoj. La kokosarboj kun plej

granda produktokvanto kovras plej grandan areon.

En 1987 teknikistoj de la Kokosarba Grupo-kompanio sukcesis disigi oleon disde akvo en la kokosa suko kaj fari naturan kokosan sukcon kun la marko Kokosarbo. Post tio ili sukcese produktis mineralan akvon, mangan sukcon kaj aliajn pli ol 100 specojn de naturaj trinkaĵoj, glaciaĵojn, tujvermiĉelojn kaj marmeladojn. Krome, ili ankaŭ prilaboris legomojn, fruktojn, kortobirdaĵojn kaj aliajn.

Nun en la ĉina merkato furoras Kokakola kaj aliaj importitaj

trinkaĵoj. Kiamaniere la grupo-kompanio okupas lokon en la merkato sub tiaj cirkonstancoj? Ĝia gvidanto s-ro Wang Guangxing (Ŭang Gŭangŝing) diris: "En la akra konkurenco ĉiu entrepreno havas siajn proprajn avantaĝojn. Produkti naturan trinkaĵon estas la avantaĝo de nia kompanio, kiun ne havas la kompanio Kokakola nek tiuj de aliaj trinkaĵoj.

En la produkta laborejo mi vidis, kiel oni premas freŝan kokoskarnon en laktoblankan sukcon kaj kiel oni miksas ĝin kun minerala akvo. Post ekzameno far monde aŭtoritata manĝaĵ-trinkaĵa administrejo oni konstatis, ke

tiu trinkaĵo sen kolesterolo atingis la internaciajn normojn pri sekureco de la manĝaĵoj. Nun ĝi estas patentita en Ĉinio, Filipinoj, Britio, Singapuro, Malajzio, Hongkong kaj aliaj landoj kaj regionoj.

Nun la grupo-kompanio estas kompanio akcia. Dank' al tio, multaj laboristoj fariĝis akciuloj kaj leviĝis ilia laboraktiveco. Ĝi planas fari teknikan kaj ekipaĵan reformadon en la venontaj 10 jaroj por ŝanĝi sin en grandan entreprenon de naturaj trinkaĵoj kun jara produktokvanto de 500 mil tunoj. ■



Loĝkvartalo de Kokosarba Grupo-Kompanio

Nova vojo por transporti karbon de norde suden

de JI PING

DECEMBRE de 1997 Ĉinio komencis realigi la planon Shenhua, kiu ampleksas konstruadon de karbominejoj, fervojoj, ŝaktaj elektrejoj, havena trafiko k.a.

La plano Shenhua celas solvi la problemon pri karba transportado. En Ĉinio la ekonomie progresaj regionoj troviĝas ĉefe ĉe la sudorienta marbordo, sed la karbominejoj ĉefe en la norda parto de Ĉinio. Ĉiujare oni transportas grandan kvanton da karbo de norde al ĉemaraj urboj de sudorienta Ĉinio. Pro limigo de la transporta povo multe da kolektita karbo amasiĝas en la nordo, dum en la sudo streĉiĝas la kar-

ba liverado. Por solvi tiun ĉi problemon Ĉinio konstruis karban dokon kaj specialan fervojon en la havenurbo Qinhuangdao (Ĉinhuangdao), okcidente de Bohaimaro, kio ankoraŭ ne povis kontentigi la bezonon de la sudorientaj ĉemaraj urboj. Ĉinio deziras, ke la efektivigo de la plano Shenhua solvu tiun ĉi problemon.

La plano Shenhua ampleksas la konstruatajn karbominejojn Shenfu kaj Dongsheng en Shaanxi (Ŝenŝji) kaj Interna Mongolio respektive. En tiuj du minejoj la konstatita karba rezervokvanto estas 230.7 miliardoj da tunoj, kiuj konsistigas kvaronon de la totala

karba rezervokvanto de la tuta Ĉinio. Laŭ kalkulo, la jara karba produktokvanto de la du minejoj atingos 60 milionojn da tunoj en la komenco de la 21-a jc. Duono de ili estos transportita al la haveno Huanghua, kiu ligos sin kun la minejoj per 1 027 km longa fervojo. La haveno situas en la orienta parto de Ĉinio. En 2003 tie aperos 4 doko, kie ankreblos 35 000-tunelaj ŝipoj kaj finkonstruiĝos ŝakta elektrejo kun totala generatora kapacito de 2 624 mil kW. Kaj la ŝipoj transportos karbon de la haveno Huanghua al sudorienta marbordo de Ĉinio kaj ankaŭ al eksterlando.

La plano Shenhua estos finita en 2005. ■

KURANTAJ AFEROJ

● En la pasintaj 50 jaroj Ĉinio ekspluatis entute 4.7 milionojn da hektaroj da virga tero kaj ĉ. 380 mil hektarojn da kaŝkarabaj ĝardenoj. Ĝis la fino de 1996 ili produktis sume 251 milionojn da tunoj da greno, 5.7 milionojn da tunoj da kotono, 5 milionojn da tunoj da seka kaŝkuko kaj multe da viando, ovoj, lakto kaj aliaj. Ili ludis gravan rolon en la disvolviĝo de la ĉina nacia ekonomio.

● La 9-an de decembro, 1997, Ĉinio lanĉis du "iridiajn satelitojn" faritajn de Motorola-kompanio de Usono al la orbito per la reformita raketo Longa Marŝo II-C en la Satelita Lanĉejo de Taiyuan. Tio estis la unua lanĉo por la 22 iridiaj satelitoj laŭkontrakte lanĉendaj en Taiyuan kaj ankaŭ la unua tasko de la lanĉejo por komerca lanĉado.

● Koncernaj fakuloj diris, ke je 10-15% devalutiĝis la mono de la landoj de Sudorienta Azio. Teorie tio malhelpos la konkurencon de la ĉinaj eksportitaj varoj, malpliigos la eksportan povon de Ĉinio kaj reduktos la profiton de la ĉina komercado. Sed fakte, unue, la strukturo de la eksportitaj varoj de Ĉinio estas multe diferenca de tiu de la landoj de Sudorienta Azio. Leviĝo de la konkurenco de la eksportitaj varoj de tiuj landoj ne multe malhelpos Ĉinion. Due, Ĉinio havas utiligeblan eksterlandan monon kun valoro de 320 miliardoj da usonaj dolaroj, el kiuj la investita sumo estis 200 miliardoj da usonaj dolaroj kaj Ĉinio pruntis de aliaj landoj entute 120 miliardojn da usonaj dolaroj, el kiuj 12% estas por mallonga periodo. Trie, ĉar de la 1-a de decembro, 1996, ĉinaj entreprenoj povas libere ŝanĝi eksterlandajn valutojn koncerne la konstantajn projektojn, tamen oni ne rajtas libere ŝanĝi por la kapitalaj projektoj, tial alilandaj valutaj spekulciistoj ne povas damaĝi la ĉinan monon *Renminbi*, pro ĉio ĉi Ĉinio daŭre tenas la stabilecon de *Renminbi*, kiam multaj landoj de Azio estas atakitaj de la financa krizo.

● Ĉina privata entrepreno Limigita Kompanio de Klimatiziloj Yuanda aĉetis en Usono jeton, kiu antaŭ nelonge sukcesis en provflugado.

Jam ne estas nova afero, ke internacie grandaj entreprenoj havas sian propran aviadilon, tamen en Ĉinio tio estas la unua fojo.

lom pri ĉinaj dialektoj

HAN-LINGVO estas uzata ĉefe de han-etno, la plejparto de la ĉina nacio, kiu, el pli ol 1.1 miliardoj da homoj, vivas sur la vasta teritorio de Ĉinio, tial han-lingvo kutime nomiĝas ĉina lingvo. Pro historiaj kaŭzoj han-lingvo havas en diversaj lokoj multajn variojn, t.e. dialektojn. En malsamaj lokoj oni aŭdas malsamajn dialektojn, el kiuj iuj estas kompreneblaj kaj aliaj tute ne.

Diversaj dialektoj malfaciligas interkomunikiĝon. Por reguligi han-lingvon kaj faciligi la interkomunikiĝon, en la 50-aj jaroj Ĉinio komencis popularigi *putonghua* (komuna parola lingvo de Ĉinio) kun la pekina sonsistemo kiel la normo de prononcado kaj la dialekto de norda Ĉinio kiel la baza kaj ellaboris la projekton por latinigi la han-lingvan fonetikan skribon. Nun la ĉinaj nacimalplimulto daŭre uzas siajn etnajn parol- kaj skriblingvojn, kaj la hanoj plejparte parolas dialektojn en siaj regionoj, tamen tutlande ĉiuj popolanoj uzas *putonghua*. En Ĉinio oni ofte parolas *putonghua* kun malsamaj lokaj akcentoj, tamen komprenas unu alian.

Kial *putonghua* prenas la nordan dialekton kiel sian bazon? La kaŭzo estas, ke la norda dialekto montras la tendencon de la disvolviĝo de han-lingvo kaj de longa tempo ĝi populariĝas tra la tuta lando. En la vasta regiono de Harbin en nordorienta Ĉinio ĝis Kunming en sudokcidenta Ĉinio, de Nankino en sudorienta Ĉinio



La aŭtoro

ĝis Jiuquan (Ĝiŭĉjŭan) en nordokcidenta Ĉinio, vivas 3/4 de la hanoj, kiuj, parolante dialektojn, povas interkomunikiĝi sen granda malfacilo, sed sude de la meza kaj malsupra Yangzi-rivero oni parolas diversajn dialektojn multe diferencajn de *putonghua*. Ĝenerale la dialektoj de la moderna han-lingvo estas dividitaj en 7 partojn, t.e. la nordan, Jiangsu-Zhejiang-an, Hunan-an, Jiangxi-an, Fujian-an, Guangdong-an kaj keĵia(keĝja)-an, kaj ĉiu el ili, escepte de la unua, estas uzata de 25 ĝis 100 milionoj da homoj. La 7 ĉefaj dialektoj povas dividi sin ankaŭ en multajn branĉojn. La divido estas farita surbaze de la lingvaj trajtoj kaj ankaŭ historiaj faktoroj.

La Jiangsu-Zhejiang-a dialekto estas parolata ĉefe en la lokoj sude de Yangzi-rivero en Jiangsu-provinco, escepte de la provinca ĉefurbo Nankino, kaj plejparto de Zhejiang-provinco. Tiu di-

alekto populariĝas ankaŭ en la famaj urboj Ŝanhajo, Suzhou kaj Hangzhou. La aliaj dialektoj estas parolataj en siaj respektivaj provincoj kaj ankaŭ en iuj urboj kaj gubernioj de aliaj provincoj, sed en iuj lokoj de sia provinco oni parolas aliprovincan dialekton. En iuj lokoj uziĝas samtempe du dialektoj. Ekz. la Guangdong-a dialekto, kiun reprezentas la kantona dialekto, estas uzata ĉefe en Guangdong, sed ĝi estas parolata ankaŭ en Guangxi, Hongkong kaj Aomen. La Fujian-a dialekto kun plej kompleksaj lingvaj fenomenoj estas populara ankaŭ en iuj lokoj de la provincoj Taiwan, Hunan, Guangdong, Zhejiang kaj Jiangxi. Keĵia-dialekto estas tute alia. En la historio la keĵia-anoj ĉiuj devenis de aliaj lokoj kaj nun ili loĝas ĉefe en Guangdong, Guangxi, Fujian kaj Jiangxi. Ankaŭ en la provinco Taiwan vivas miliono da keĵia-anoj. En Shenzhen, plej frue fondita speciala ekonomia regiono de Ĉinio, oni parolas ĉefe la Guangdong-an dialekton kaj ankaŭ keĵia-an, sed nun ĉiuj ĝiaj novaj enmigrintoj parolas *putonghua*. Nun la eksterlandaj ĉinoj plejparte parolas Guangdong-, Fujian- kaj keĵia-dialektojn kiel sian gepatran lingvon.

En Ĉinio ĉiuj dialektoj havas siajn proprajn trajtojn. Ĝenerale, la Fujian-a kaj Guangdong-a dialektoj multe diferencas de *putonghua*, dum la diferenco inter la Jiangsu-Zhejiang-a dialekto kaj *putonghua* estas malpli granda kaj la diferenco inter la branĉoj de la norda dialekto kaj *putonghua* — plej malgranda.

La frapanta diferenco inter diversaj dialektoj kaj *putonghua* troviĝas en prononco. Tio montriĝas en diferenco de konservado de primitivaj prononcoj de diversaj dialektoj, ekz. *n* kaj *l* estas konsonantoj tute malsamaj en prononcado en la antikveco, kaj iliaj malsamaj prononcoj estas konservataj eĉ hodiaŭ en la pekina kaj aliaj dialektoj, dum en iuj

aliaj dialektoj ili kunfandiĝis, tiel ke aperis fenomeno: anstataŭ *lan* oni prononcas *nan*, aŭ inverse. Ĝenerale dirite, la prononca sistemo de *putonghua* estas multe simpligita, kompare kun tiu de la antikva han-lingvo, dum en multaj dialektoj de la suda parto de Ĉinio estas pli-malpli konservataj antikvaj prononcoj. Krome, dum sia evoluo iuj dialektoj estis influataj de eksteraj faktoroj aŭ mem evoluis, tiel ke formiĝis en ili apartaj fonemoj.

Alia grava diferenco inter la diversaj dialektoj kaj *putonghua* troviĝas en la vortoj, precipe en la ĉiutage uzataj vortoj kaj vortoj esprimantaj apartajn lokajn aferojn, ekz. personaj pronomoj kaj titoloj de parencoj. Tiurilate troviĝas diferencoj ne nur inter diversaj dialektoj, sed ankaŭ inter iliaj branĉoj. Ili montriĝas ĉefe en tio, ke unu vorto havas malsamajn signifojn. Ekz. la vorto faruno signifas nur vermiĉelojn en la dialektoj de suda Ĉinio, dum en

tiu de norda Ĉinio ĝi signifas ne nur farunon mem, sed ankaŭ vermiĉelojn. En la Suzhou-a dialekto oni diras “manĝi cigaredon” (fumi) kaj “manĝi teon” (trinki teon). Ankaŭ unusignifa vorto povas havi plurajn esprimojn. Kiel ekzemple, oni nomas lampiron vagluma insekto, luminsekto aŭ noktofajra knabino. Videble, la diversaj dialektoj iagrade konservas vortojn de la antikva han-lingvo kaj iuj el ili eĉ enkondukis en sin alilingvaj vortojn. Ekzemple en mia naskiĝloko oni nomas cementon *simentin*.

Gramatike la ĉinaj dialektoj havas inter si malpli da diferencoj, kiuj tamen estas diversaj. En han-lingvaj dialektoj ne mankas fenomenoj, ke oni esprimas gramatikan signifon pere de la ŝanĝiĝo de prononco, tio estas tre malofta en *putonghua*; kaj plie, en la dialektoj substantivo, adjektivo kaj verbo ofte uziĝas duoble por akcenti la sencon. Oni ankaŭ aldonas prefiksojn aŭ sufiksojn

por montri ian gramatikan signifon. Koncerne la konstruon de frazo, ĝenerale, estas laŭvice subjekto — predikato — objekto, kompreneble, estas esceptoj. En la dialektoj de suda Ĉinio oni ofte metas antaŭen la objekton, kiu montras aferon, kaj malantaŭen tiun objekton, kiu montras homon.

Estas malofte vidataj la abundeco kaj komplekseco de la han-lingvaj dialektoj. Kiel komunikilo en certaj lokoj, la dialektoj ludas gravan rolon en la socia vivo. En iuj literaturaj verkoj, televidaj programoj kaj filmoj oni aplikas koncernajn dialektojn cele pliigi la esprimivon. Por riĉigi sin ankaŭ *putonghua* asimilas utilajn esencajn partojn de iuj dialektoj. Ekz., la fama ĉina klasika romano “Ruĝdoma Songo” estas verkita ĉefe en la norda dialekto. Dank’ al popularigo de *putonghua*, jam en sia infanaĝo oni komencas lerni ĝin, sekve de tio interkomunikiĝo en Ĉinio fariĝas pli kaj pli facila. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Feng Sisi, 13-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj tm. pri lernado, fremdaj lingvoj kaj muziko. Adr.: 8-307, Shanwai st., Nan'an Lu, Xichang, 510160 Guangzhou, Guangdong, Ĉinio.

* Wang Haidong, 12-j. lernanto, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj tm. pri lernado, pentraĵo kaj futbalo. Adr.: 8-303, No. 111 Lihua Lu, 510010 Guangzhou, Guangdong, Ĉinio.

* S-ro Wen Gang dez. kor. kaj interŝanĝi kun geesperantistoj (20-70j.) el la tuta mondo Esperante kaj angle pri ĉiuj temoj, precipe pri komercado, turismo, tekniko, kulturo, ĉina medicino, filatelo, kolektado ktp. Esperante kaj angle. Adr.: 356, Beijing Donglu, Sheng Jijie Shigong Gongsi, 330029 Nanchang, Jiangxi, Ĉinio.

* Nikaragvaj esperantistoj dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Esperanto Klubo de Nikarago,

S-ro Eddy Silva Molina, Sucursal: Ciudad Jardin, Apartado Postal: T-67, Managua 12, Nicaragua.

* Vladimir Pys serĉas amikojn el la tuta mondo por reciproka interŝanĝo de telefonaj kartoj. Adr.: Martinovska 3013, 723 00 Ostrava, Ĉeĥio.

* Kurbanovic Zlatko, 37-j., dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj uzatajn telefon-kartojn. Adr.: Str. Braca Vidulic 14, Mali Losinj, Kroatio.

* Car Prinleggi Nives, fraŭlo, dez. kor. tm. Adr.: Sdudenac 19, Mali Losinj, Kroatio.

* Tutmonda Gastigo Inter Esperantistoj. Pasporta Servo de TEJO. UEA, Pasquale Zappelli, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ, Rotterdam, Nederlando. Tel.: +31-10-436-1044. Fax: +31-10-436-1751. E-poŝto: uea@inter.nl.net.

* Televida Kurso “Esperanto, Pasporto al la Tuta Mondo”. Unuaj kvar lecionoj: 85 USD. Tuta serio kostos: 300 USD. ELNA, P.O.Box 1129, El Cerrito, California-94530, Usono. Tel: 1-510-653-0998. Fax: 1-510-653-1468. Retpoŝte: <lusiharmon@aol.com>



Romantikeco kaj praktikemo de Licius

de XIANG HONG



IUJ neesperantistoj nomas Esperanton utopia lingvo por signifi ĝian nerealigeblecon. Tiusence la esperantistoj do estas utopiistoj. Tamen, s-ro Licius, samkiel multaj aliaj esperantistoj, ne tiel opinias. Kiel lingvistika profesoro de la Pekina Normala Universitato, li diris: “Mi havas plenan motivon por esti optimisto pri la estonteco de Esperanto.” Li preferas esti romantika idealisto.

Jes, ĉu vi uzas Esperanton aŭ ne, ĉu vi ŝatas ĝin aŭ ne, se vi komprenas la esencon de esperantismo: peneme disvastigi Esperanton, neŭtralan artefaritan lingvon, en la tuta mondo, vi ne povos ne konfesi, ke Esperanto estas lingvo romantika. Ĝuste tio

konformas al la romantikeco de Licius, kiu decidis ellerni la lingvon tuj kiam li unuafoje aŭdis pri ĝi. Tamen li ekkontaktis ĝin jam dekelkajn jarojn poste.

Frue en la 60-aj jaroj, kiam Licius lernis en la angla-lingva fakultato de Jinan-universitato en Kantono, li informiĝis pri la naskiĝo kaj idealo de Esperanto kaj pri famaj ĉinaj e-istoj, kiaj Chen Yuan kaj Chun-Chan Yeh. Li ege deziris lerni ĝin, sed ne havis ŝancon kontakti e-istojn. En 1970-1978 li instruis la anglan lingvon en mezlernejo de Kantono. Poste li sukcesis en ekzameno por lerni kiel esplor-studento en la lingva instituto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj en Pekino. Hazarde, li trovis, ke lia

kunlernanto lernis Esperanton kaj konas veteranan e-iston Tikos, torĉtenanton de la ĉina Esperanto-movado. Kelkajn tagojn poste, li estis rekomendita al la bonkora maljunulo, kiu varme akceptis lin kaj donis al li siajn mimeografitajn lernomaterialojn kaj libron “Fundamenta Krestomatio”, por ke li mem lernu. Li kun granda entuziasmo lernis la lingvon. Duonjaron poste, li kompilis kaj eldonis la libreton “Elementa Vortlisto de Esperanto kun Komparo de Ok Lingvoj”. En 1980 li ĉinigis la libron “Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto” verkitan de J. Wells en 1978. Dank’ al helpo de s-anoj Honfan kaj Zhu Xueli, ĝia ĉinlingva eldono aperis en aprilo 1992.

Licius opinias, ke por antaŭenpuŝi la Esperanto-movadon en Ĉinio, oni devas fari la jenon: 1) plifortigo de unuiĝo de lokaj asocioj kaj plibonigo de ilia laboro; 2) instruado de Esperanto en altlernejoj; 3) disvastigo de Esperanto en scienca rondo. Li opinias ankaŭ, ke sen praktikado Esperanto restus romantika utopio kaj simpla idealo de Esperanto ne estas sufiĉa.

Kiam li finis lernadon en la lingva instituto kaj eklaboris en Pekino, en lia hejmloko Kantono, la ĉefurbo de Guangdong-provinco, ankoraŭ ne estis E-grupo. Dank' al klopodo de Licius, Tikos kaj aktivuloj de Kantono, fondiĝis la Guangdong-a E-Asocio en 1982, kaj Licius estis elektita kiel ĝia konstanta komitatano. Li estas ankaŭ konstanta komitatano de la Pekina E-Asocio kaj membro de la Ĉina Societo de E-instruado en Superaj Lernejoj. Li tenas bonajn rilatojn kun aktivuloj, kiaj Hu Guozhu kaj



S-ro Licius (la kvara de maldekstre) en la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo en 1996

Li instruis Esperanton 14 jarojn. De 1983, krom instrui la anglan lingvon al esplor-studentoj en la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, li ankaŭ funkciigis E-kurson. Poste li laboris en la Pekina Normala Universitato, kaj

en 1988 li komencis instrui en ĝi Esperanton kiel duan fremdan lingvon. De tiam en pli ol 30 kolegioj kaj universitatoj funkciis Esperanto-kurso. Tamen pro diversaj kaŭzoj neniu, krom Licius, daŭrigis E-instruadon pli ol dek jarojn. Licius, kompreneble, fieris pro sia faro. Menciindas, ke lia

filo vizitonta mezlernejon estas denaska esperantisto. La patro kaj filo parolas nur Esperante unu kun la alia.

Tamen tio, kion li plej ŝatas, estas esplorado pri lingvoj, inkluzive de Esperanto. Licius diris, ke de infaneco li havis firman volon fariĝi poeto, historiisto kaj

paleografo, kiel Guo Moruo, fama moderna literaturisto de Ĉinio. Li memfiditas ne nur pri sia talento de poezio, sed ankaŭ pri sia persistemo kaj diligenteco. De multaj jaroj li ĝuas ekskluzive verkadon kaj esploron de lingvoj. Nur pli-ol-50-jara, li havas preskaŭ tute grizan hararon. *La Mondo*, organo de la Ĉina Esperanto-Ligo, publikigis lian artikolo-serion "Elementaj Problemoj de Esperanta Gramatiko" kaj "Internacia Lingvo kaj Interlingvistiko". Li ankaŭ verkis artikolojn Esperante kaj ĉine pri "Yi Jing", konfuceanisma klasikaĵo de Ĉinio. Lia Esperanta tradukaĵo de "Li Sao", ĉefverko de Qu Yuan (ĉ. 340-278 a.K.), plej frua poeto de Ĉinio, estis eldonita de la E-Asocio de Los-Anĝeleso en 1984, de la japana Sendai-a E-Asocio en 1987, de la ĉina Hubei-a E-Asocio en 1988 kaj de la ĉina Hunan-a E-Asocio en 1989. Por solvi la problemon pri la ĉapelitaj literoj de Esperanto en komputila tajpado li prezentis bonan projekton. Li verkis pli ol 200 ĉinajn poemojn en klasika stilo kaj pretas publikigi ilin. Ni deziras al li sukceson. ■



S-ro Licius kaj lia filo prezentantaj Esperantan kanton

Xie Yuming. En 1984 kiel invito-esploristo li studis en Los-Anĝeleso unu jaron. Dume li partoprenis la 3-an Pacifikan Kongreson de Esperanto en Portlando, Usono, kaj kontribuis per artikoloj por konigi la ĉinan E-movadon kaj diskuti pri lingvistiko de Esperanto.

PUPO-SKULPTISTO

XU ZHUCHU

Teksto kaj fotoj de HAN HONG



Xu Zhuchu

En sia 40-jara artista vivo Xu Zhuchu lernadis de la antaŭuloj kaj samtempe kreadis novajn tipojn. Li ellaboris pupojn de pli ol 400 specoj, inter kiuj estas homfiguroj de klasikaj romanoj, feoj kaj diabloj de popolrakontoj... Ili havas malsamajn vizaĝojn, diversajn mienojn. La ver-simileco kaj viveco prezentas la trajtojn de la figuroj. La pupoj faritaj de li ne nur estas multe uzataj kiel rekvizitoj, sed ankaŭ rigardataj kiel valoraj artaĵoj, kiuj estas delikataj kaj belegaj. Multaj vizitantoj estas allogitaj al la Pupa-arta Muzeo, kie eksponiĝas diversaj pupoj faritaj de li.

Li naskiĝis en familio de pupartisto en Zhangzhou, unu el la pupartaj luliloj de Ĉinio. Kreskante en puparta medio, li kaj vizitis lernejon kaj lernis skulptadon de pupo. Infane li faris pup-kapon, per kiu li gajnis la plej altan premion en la ekspozicio de artaĵoj faritaj de ĉinaj geknaboj.

Xu Zhuchu jam desegnis kaj faris pupojn por pli ol 30 filmoj. Liaj skulptaĵoj eksponiĝis en diversaj lokoj ĉinaj kaj alilandaj kaj estas konservataj de multaj muzeoj kaj artistoj tra la mondo.



La ĉefroj Jia Baoyu kaj Lin Daiyu de la ĉina klasika romano "Ruĝdoma Songô"



Homfiguroj de la ĉina klasika romano "Tri Regnoj"



Drakreĝoj

Floraj amkantoj (Stornelo)

de LICIUS

(virvoĉe)
He, kiu floro
printempe floras pompe?
Kio povas
rivali ĝian belon kun
honoro?

(virinvoĉe)
Kapoko floras
printempe kvazaŭ fajro.
Heroeco
ĝin indas: tian bravon mi
adoras.

(virinvoĉe)
Ho, kia floro
somere floras ĉarme?
Kiom ĝian
gracion oni tenas en
memoro?

(virvoĉe)
La rozo floras
somere ride ruĝa. Ĝi briligas
knabinon: tuj je l' ravo
mi angoras.

(virvoĉe)
Nu, kiaj floroj
aŭtune floras arde? Kiu estas
sublima, vere nobla kun
valoroj?

(virinvoĉe)
Kikuoj *floras
aŭtune cent-koloraj. Plej
elstaras
la ora: ĝiajn virtojn mi
trezoras.

(virinvoĉe)
Nun, kiu floro
en vintro floras vive?
Kiam ĝi ne
aromos, kiel herbo sen
fervoro?

(virvoĉe)
Umeo floras
dum vintro apud neĝo.
Pure pura
ĉiam ĉe mia brusto ĝi odoras.

* Kikuo: krizantemo.

Premio Fonto-Iltis

El la revuo *Eventoj* (1997, n-ro 133, p. 1) legeblis la jena komuniko:

En la nokto de la 5-a al la 6-a de septembro 1997 nekonataj personoj eniris perforte en unu el niaj lokaloj en la avenuo Gambetta. Ili perfortis la pordon, eligis ĉiujn meblojn kaj arkivaĵojn (dokumentoj arkivigitaj de post la jaro 1921) kaj masonis la enirejon. Plendo kontraŭ nekonato estis farita ĉe la justicpolico. Por vidi la necesan pluajn paŝojn necesas atendi la traktadon kun la asekuristoj.

Temas efektive pri nekredbla kaj senprecedenca evento en nia movado. Kiu povus ŝteli la kompletan arkivon de SAT kaj, kvazaŭ moke, eĉ masoni la pordon?

Jen demando solvota kredeble ne nur de la pariza polico, sed ankaŭ tikla por ĉiu detektivo aŭ verkisto de detektivaĵoj. Tial, por solvi la problemon almenaŭ en la limoj de la fantazia probableco, la eldone-

joj **Fonto** en Brazilo kaj **Edition Iltis** en Germanujo decidis premion de **500 NLG** por la plej bona detektiva romano pri la temo "Kiu ŝtelis la SAT-arkivon?"

Rajtas partopreni ĉiu verkemulo kun la escepto de oficistoj kaj estraranoj de SAT. La manuskripto devas atingi unu el la eldonejoj plej malfrue la 30-an de junio 1998. Kopio estu sendita al la dua eldonejo. La romano ampleksu minimume 100 presitajn paĝojn. La premio nuligos, se antaŭ la limdato la polico sukcesos klarigi la aferon. La decido pri la plej bona konkursaĵo rezervas al si la du eldonistoj. La premiita verko aperos kiel komuna eldono de Fonto-Iltis.

Adresoj: (1) **FONTO**, Gersi Alfredo Bays, Caixa Postal 49, BR-89801-970 Chapec (SC), Tel/Fakso: +55-497-221454 (2) **Edition Iltis**, Irmu Haupenthal, Schulstr. 30, D-66133 Scheidt, Tel: +49-681-811653, Fakso: +49-681-816713



Floroj sur montoj ornamas nian Ĉinio

Teksto de LANG KAIYONG k.a.

Fotoj de DU ZEQUAN k.a.

Anemono

La topografio de Ĉinio pli kaj pli altiĝas de oriento al okcidento. La montregiono de Ĉinio konsistigas 70% de la totala areo de la lando, inter kiuj 26% estas altebenaĵoj. Plejparto de la altebenaĵoj interligiĝas. Ili estas majestaj, apikaj kaj belaj. Sur altebenaĵoj de diversaj latitudoj, altitudoj kaj topografioj kreskas pinglarboj, arbedoj, herboj ktp. Diverskoloraj floroj sur

montoj estas ĉefa parto de la kreskaĵoj. Ili ĉarmas kaj donas vivon al la altebenaĵoj.


Tiuj florphantoj havas malsamajn aspektojn, tamen kun komunaj karakterizaĵoj. Unue ili estas malaltaj, ĉar en la altaj regionoj estas tre froste, eĉ en somero neĝas, kaj la temperaturoj de tago kaj nokto havas grandan diferencon, tial la plantoj kreskas malrapide; due iliaj tigoj kaj folioj estas dikaj,

kaj radikoj fortaj. Dikaj tigoj kaj folioj povas konservi multe da aero. Kaj la floroj de diversaj koloroj estas tre belaj.

Florphantoj sur montoj estas ĉefa parto de la tergloba biosfero. Ili ludas gravan rolon en protekto de la ekologia ekvilibro kaj naturo. Do necesas koni, protekti kaj utiligi ilin por plibonigi nian vivmedion kaj levi nian vivkvaliton.




Lilio



La neĝmonto Langbokang en Tibeto





Rododendro



Cirsio



Reumo (*Rheum nobile*) sur alta monto en suda Tibeto

Huashan-monto en miaj okuloj

BUDHISMAJ kaj taoismaj ermitoj opinias, ke kvietaj lokoj povas helpi ilin transcendi ĉiajn aferojn kaj neniu loko estas pli taŭga ol Huashan-monto.

Kvankam la menciita monto en Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco estas unu el la taoismaj sanktejoj, tamen la atmosfero estas for de kvieteco, ĉar la loka registaro sin streĉas por disvolvi la lokajn turismon kaj industrion.

Estas kvin montpintoj sur Huashan — la Norda, Suda, Orienta, Okcidenta kaj Centra Montpintoj. El ili la Suda Montpinto, 2 160 m super la marnivelo, estas la plej alta. Per telfero ni suriris sur la Nordan Montpinton. Principe mi ne ŝatas telferon, tamen ne praktikeblis por la kunirantaj fotografistoj grimpi sur la monton kun pezaj aparatoj. Kaj plie, eĉ sur la vojo plej facila, oni devus trapasi la ŝtonan ŝtuparon longan kaj krutan, kun helpo de la ĉeno pendanta ĉe la ŝtuparo.

La kvin montpintoj estas ligitaj de mallarĝaj monteĝoj traireblaj nur por unu homo. Ĉe tiuj krutaj monteĝoj staras fenomenaj konstruaĵoj: temploj, gastejoj, budoj de manĝaĵoj kaj memoraĵoj. Ĉie estas ĝojoplenaj turistoj, kiuj tute ne konscias, ke ili estas proksimaj je nur unu paŝo al la krutaĵo 2 000 futojn alta.

Sub la Suda Montpinto ni noktis en nova hotelo kun kompleto da ekipaĵoj, inkl. de banĉambro (kvankam mi ne scias, de kie elkondukiĝis la akvo). En la sekvanta tago, sub insistado de la fotografistoj, ni ellitiĝis antaŭ la

tagiĝo por rigardi sunleviĝon. Strange, neniu kunportis poŝlampojn aŭ alumetojn. Tiel preskaŭ en mallumo ni stumble iris al la Orienta Montpinto.

Neatendite, la suno decidis ne leviĝi tiun matenon. Tio pli-malpli malesperigis nin, ĉar la plata montpinto rigardanta al oriento certe estas taŭga por ĝui klaran sunleviĝon.

Ni konsumis ĉ.10 horojn por malsupreniri de la montpinto al Huashan-hotelo ĉe la montpiedo. Preskaŭ je ĉiu paŝo ni vidis novan pejzaĝon. Portistoj malfacile iris sur la montvojo, kun konstruaj materialoj sur la ŝultro.

Huashan-gubernio apartenas al la urbo Huayin, trapasata de fervojo kaj ŝoseo. Okcidente de la urbo troviĝas internacia flughaveno. Urbestro Lei Mengbin diris al ni, ke kun rapida evoluo de industrioj elektra, maŝina, manĝaĵa kaj medikamenta, Huayin baldaŭ fariĝos industria centro en tiu parto de Shaanxi.

Sur la proksimaj montoj, inkl. de Huashan-monto, estas ekspluatataj orminejoj. S-ro Lei diris ankaŭ, ke bonvena estas alilanda investado. Antaŭ nelonge en Huayin establiĝis kabla telekomunika ekipaĵo por pli faciligi kaj rapidigi interŝanĝon de informoj.

La sekvanta vojaĝo donis al ni neatenditan ĝojon, t.e. la vojaĝo al la urbo Hancheng proksima al Huashan. Fakte mi neniam aŭdis ĝian nomon. Tie naskiĝis la fama historiografo Sima Qian de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.). Lia tombo en Taishi-templo estas unu el la lokaj vidindaĵoj.

Pli alloga estas la vilaĝo, kiu estas bone konservata ekde Ming-dinastio (1368-1644). Tamen ĝi ne estas tia “kampa muzeo”, ĉar ĝi estas plene loĝata de vilaĝanoj, kiuj tute ne atentis la turistojn scivolemajn. Televidaj antenoj estas zorgeme kaŝitaj en nerimarkebla loko. La loka elementa lernejo naskiĝis, tamen, ne en Ming-dinastio. La infanoj estas tiel scivolemaj al la moderna mondo kiel ni al ilia antikva mondo.

La tombo de Sima Qian estas fokuso de la turismo de Hancheng. Ĉie videblas liaj nomo kaj portreto. La lokanoj fieras pro Sima Qian kaj ankaŭ pro Taishi-biero, kiu, laŭ mia opinio, estas la plej bona en Ĉinio. ■



La aŭtoro (dekstre) sur la supro de Huashan-monto



Tibet-naciaj knabinoj

Tibet-nacianoj en okcidenta Sichuan


Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

Aŭtune de 1997, mi vizitis regionon de tibet-nacianoj en okcidenta Sichuan-provinco. La lokaj paŝtistoj multe parolis pri la subvencio de la loka registaro por konstruado de loĝejo, herbejo kaj stalo.

Tie la tibet-nacianoj paŝtis sur herbejo ĉe rivero laŭ la tradicio de miloj da jaroj. Iliaj brutoj estis grasaj en aŭtuno, suferis froston en vintro kaj mortis en printempo. Komence de la 80-aj jaroj, la loka registaro ekpraktikis la politikon, ke homoj havu loĝejon, herbejojn barilon kaj brutojn stalon. Laŭ plano, la loka registaro subvenciis la paŝtistojn por konstrui fiksan loĝejon; la herbejoj estis disdividitaj al ĉiuj paŝtistaj familioj, kiuj ĉirkaŭigis sian propran

herbejon per barilo, tiel ke ankaŭ en vintro la brutoj havas furaĝon; la paŝtistoj konstruis stalojn kun diversaj grandecoj. Dekkelkaj jaroj pasis, la vivo de la tibet-naciaj paŝtistoj pliboniĝis. La herbejoj ricevis novan fizionomion.

Kun tiuj konstruaĵoj la paŝtistoj povas bone batali kontraŭ naturaj katastrofoj. Printempe de 1995, neĝa katastrofo atakis la regionon. Neĝadis 56 tagojn. La jara neĝkvanto estis 2-3-oble granda kiom tiu en ordinara jaro. La neĝtavolo dikis ĉirkaŭ 60 cm. Dank' al la konstruitaj loĝejoj, bariloj kaj staloj, la paŝtistoj malmulte perdis. La sukceso inspiris ilin pli diligente labori por feliĉa vivo.




Herbejo kun barilo




Novaj loĝdomoj de paŝtistoj



Melkado





Sur paštejo

Mistera reg

de PANG NAIYING


LA regno Loulan, startpunkto de la suda branĉo de la Silka Vojo, situis okcidente de la lago Lopnur meze de Xinjiang (Ŝinĝjang). Hodiaŭ ni ne plu povas kiel prauloj boati laŭ la rivero Pavo al Lopnur por viziti Loulan. La Lopnur-anoj, kiuj servis siatempe kiel ĉiĉeronoj kaj interpretistoj al vojaĝantoj, mistere malaperis antaŭ tre tre longe, kvazaŭ ili forlasus sian hejmlokon dum unu nokto, “forportante” Lopnur, ĉe kiu ili vivis de malproksima generacio. Kial ili foriris? Kaj kien ili iris? En la komenco de la 80-aj jaroj de la kuranta jarcento ĉina sciencisto Peng Jiamu (Peng

Ĝjamu) vizitis Lopnur kun la intenco solvi tiun enigmon, sed li perdiĝis; en la sama tago post 16 jaroj iu esploristo, kiu sola konkeris la senlivejon en Ali de Tibeto, same ne povis eliri el Loulan...

“MARO DE MORTO”

Okcidente de Lopnur etendiĝas la dezerto Taklimakan kun areo de 337 mil kvadrataj kilometroj. En la ujugura lingvo Taklimakan signifas maron de morto.


Tie vidiĝas neniu birdo nek besto. Tage furiozas sabla ventego kaj nokte flagras vaglumo. En la 7-a jc. bonzo Xuanzang de Tang-dinastio (618-907) okci-



no Loulan

denten vojaĝanta por peti sutron malfacile iris en la dezerto. Kvankam li nenion timis, tamen li estis ege turmentata de manko de akvo. Elĉerpita, li silente preĝis al Avalokitesvaro, kuŝante sur sablo... Poste, malvasta oazo savis lin. En la 18-a jc. erudiciulo de Qing-dinastio (1644-1911), vivinte du jarojn en la Okcidenta Regiono, skribis, ke en Tianshan-montaro troviĝis vento-kavo granda kiel puto, el kiu ofte blovis ventego. Ne sukcesinte ĝin eviti, veturigantoj kunligis per dika ŝnuro siajn ĉarojn, kiuj tangadis en ventego kiel ŝipoj sur ondanta riverego. Se unu ĉaro sola renkontis

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





Ruino de pagodo en Loulan

Foto de LIU YUSHENG



Ruino de loĝdomoj de Loulan-anoj

Foto de CHEN HEYI



Sunleviĝo en Loulan Foto de CHEN HEYI



Esplorado de antikvaj
tomboj en Loulan
Foto de CHEN HEYI

tian ventegon, ĝi leviĝis kvazaŭ malgranda folio fluganta en la ventego.

Oriente de Lopnur estas regiono de vento. La tieaj interkruciĝantaj stratoj, dissemnitaj domoj, imponaj kasteloj, groteskaj fenestroj kaj pordoj, ĉiuj estis faritaj de ventego, kiu kvazaŭ brutala monstro hurlante trapasis stratojn kaj penetris en domojn. Dum ventego multaj lacaj vojaĝantoj perdiĝis en la dezerto.

Historie Lopnur portis ankaŭ la nomon Sala Lago. Ĝi estis la plej granda salakva lago de Ĉinio. Ĝin ĉirkaŭis malmola salatero. Ĝin fosinte, oni ricevis salobrikon grandan kiel kapkuseno. La indiĝenoj ofte dormis kun salobriko kiel kapkuseno, opinante, ke ĝi estas kvietiga kaj utilas al okuloj. Ili ankaŭ tributis salajn kapkusenojn al la kortego.

Ĉar Lopnur kuŝas en la plej malalta loko de la baseno Tarim, en ĝin fluis ĉiuj riveroj de suda Xinjiang. Kiel historia libro diras, en Lopnur fluis 60 riveroj kaj ankaŭ multaj subteraj. Ili plejparte fontis el glaciaj kavoj de Tianshan-montaro nordokcidente de la dezerto. Tie estis trapasejo inter norda kaj suda Xinjiang. Dika tavolo da neĝo kovris la vojon. Mispasinte, homoj kaj brutoj povis malaperi en la neĝo. Glacio blokis la vojon. Por firme stari sur ĝi, la pasantoj devis kolekti ostojn de brutoj kaj sterna ilin sur la vojo. Sur glacia krutaĵo ili devis ĉizi ŝtuparon por antaŭeniri. Troviĝis glaciaj fendoj ege profundaj, el ili aŭdiĝis bruego de akvo. La eliĝinta akvo fluis 2 500 km sudorienten. Ĉiuj ĝiaj branĉoj venis en Lopnur. Tial Loulan fariĝis akvolando en la dezerto.

KRUCIĜEJO DE LA SILKA VOJO

Loulan najbaras al la Koriadora Regiono Okcidente de la Flava Rivero en oriento kaj rigardas al Kashi trans la dezerto Taklimakan en okcidento. En ĝi la Silka Vojo disbranĉiĝis kaj kondukis okcidenten laŭ la randoj suda kaj norda de la dezerto. Tiel, Loulan fariĝis kruciĝejo de la Silka Vojo. Marco Polo, fama itala vojaĝisto de la 13-a jc., diris: "Por transiri la dezerton ĉiuj vojaĝantoj devas ripozi unu semajnon en Loulan kaj prepari provianton sufiĉan por unu monato..."

Historie, hunoj iam okupis Loulan. Malamike al la kortego de Centra Ĉinio, ili murdis ĝiajn senditojn al la Okcidenta Regiono. Reboniĝis la rilatoj inter la kortego kaj Loulan en la jaro 77 a.K., kiam surtroniĝis Wei Tuqi (Ŭej Tuĉi), nova reĝo de Loulan. Timante, ke hunoj reatakos lian regnon, li petis, ke la kortego de Centra Ĉinio sendu armeon al la urbo Yixun (Jiŝjun) proksime de Loulan por garnizoni kaj kulturi teron. Post la alveno de la armeo el Centra Ĉinio, Loulan ŝanĝis sian nomon en Shanshan kaj suden translokiĝis sian ĉefurbon. Kaj la garnizono konstruis signalturojn de la pasejo Yumen ĝis Loulan kaj poste teran kastelon, kiu servis kaj kiel postiljona stacio kaj kiel grenejo, kun plej altranga oficisto, kiu bredis por la ŝtato ĉevalojn kaj kies familianoj bredis por ĝi kamelojn. La brutoj estis je dispono de diversregnaj komercistoj.

En Loulan multaj gastejoj kaj komercistoj. Tage kaj nokte aŭdiĝis tintado de kamelaj sonoriloj. Ĉiujare Loulan akceptis dekkelkajn delegaciojn mak-

simume el centoj da homoj kaj minimume el centkelkaj. Gastamaj Loulan-anoj servis al ili kiel ĉiĉeronoj kaj eskortantoj kaj transportis por ili akvon kaj manĝaĵojn.

ENIGMO DE MALAPERO DE LOULAN

En la 4-a jc. tiu vivoplena regno mistere malaperis. Kaj post sabloŝtormo komence de la 20-a jc., ĝi mirakle reaperis: apenaŭ distingeblas la urbomurego; la difektita konstruaĵo el adoboj 2 m alta, kun muroj dikaj je unu metro, en la sino de la urbo, eble estis la reĝa palaco de Loulan; oriente de la urbo estas la ruino de budhisma pagodo konstruita el adoboj, ligno de poplo (*Popular diversifolia*) kaj branĉoj de tamariko; sudokcidente de la urbo staras ruinaj muroj de loĝdomoj ĉe la bordoj de antikva rivero fluanta tra la urbo... Laŭ tiuj signoj sciencistoj eksplikis la enigmon de malapero de Loulan.

Iuj diris, ke la invado de la tribo Gaoche pereigis Loulan. Sed la tribo invadis Loulan por okupi ĝian teron, kaj ne eblis, ke ĉiuj loĝantoj forlasis ĝin. Aliaj opiniis, ke oni forlasis Loulan pro ŝanĝiĝo de la Silka Vojo. Tamen iuj fakuloj trovis 970 monerojn de Tang-dinastio sub giganta ŝtono ĉe la Silka Vojo. Tio montras, ke la Silka Vojo daŭre iris tra Loulan en la 8-a jc. Tial triaj asertis, ke Lopnur senakviĝis pro sekiĝo de glaciaj fluoj kaj la rivero Pavo. Tamen iuj fakuloj opiniis, ke la rivero Pavo sekiĝis nur post konstruado de baraĵo en ĝia supra parto meze de la kuranta jarcento kaj iom poste. En 1934 iu ĉina geofizikisto boatis laŭ la rivero Pavo al Lopnur por fari esplordon. Kvankam Lopnur fariĝis

sala baseno, tamen ĝi abundas je subtera akvo. En 1980 Peng Jiamu kaj liaj kolegoj fosis tie puton nur 2 m profundan, kies akvo sufiĉis por dekoj da homoj.

SERĈI LOPNUR-ANOJN

Lopnur-anoj ne foriris antaŭ kvarmil jaroj. Tie troviĝas ilia tombejo. Pro tio, ke la tombejo ĉirkaŭita de palisoj en sep ĉirkloj similas al suno, oni nomas ĝin Suntombejo. Arkeologoj rimarkis, ke en la tomboj ĉiuj viroj estas nudaj en pinta felta ĉapo ornamita per plumoj, kun kapo direktita al oriento.

En iu tombo kuŝas virino. Sendube ŝi estis ĉarma kun alta nazo, profundaj okulhavoj, longaj okulharoj kaj brunaj kapharoj pendantaj ĝis la ŝultroj. Kvankam ŝi ne kiel aliaj virinoj ruĝigis siajn ungojn, tamen ŝi tenis en la mano lignan kom-

timante, ke li malsatos, lia patrino faris al li lakto-sakon el ŝafa mammo kaj lakto en ĝi jam solidiĝis. Alia infano havas malgrandan kapkusenon en formo de koko. La patrino esperis, ke ŝia bebo vekigĝos, kiam koko kokerikas, sed li dormis jam dumil jarojn.

Antaŭ dumil jaroj Lopnur-anoj vivis vivon nomadan kaj fiŝistan. Ili paŝtis brutojn sur herbejo, loĝis ĉe la lago, faris boaton el popla ligno kaj kaptis fiŝojn en la lago... Kiam poplaro grandaree velkis pro tago-posttaga malmultiĝo de laga akvo, Lopnur-anoj ellaboris "arbaran leĝon" kaj ĝin skribis sur lignaj slipoj: tiu, kiu hakis arbon ĉe radiko, estos punita per dono de ĉevalo; tiu, kiu derompis branĉon, estos punita per dono de bovino.

Fakte, Lopnur havas civilizacion de pli ol dek-mil jaroj, tamen ni preferas scii, kien iris Lopnur-anoj. Post esplorado iuj diris, ke tiuj, kiuj kun la familia nomo Shan loĝas en Qinghai-provinco, sudokcidenta Ĉinio, kaj en Luoyang de Henan-provinco, centra Ĉinio, estas posteuloj de Lopnur-anoj; kaj aliaj opiniis, ke en la lokoj kun la nomo Shanshan aŭ kun homofono de Loulan en suda Xinjiang probable vivas posteuloj de Lopnur-anoj, tamen ili plejparte estas mikssangaj, ĉar la Okcidenta Regiono estis "granda familio de nacioj".

Ĉe la fino de la 19-a jc., iuj trovis en Lopnur tribon de fiŝistoj. Kun haŭto maldelikata kaj bruna, ili parolis malsamajn

lingvojn, manĝis fiŝojn anstataŭ grenon, faris veston el juto aŭ el plumoj de sovaĝaj anseroj kaj uzis flugilojn de akvobirdoj kiel matracon. Iliaj vivkutimo kaj moro estis samaj kiel tiuj de Abudan-vilaĝanoj. La vilaĝoj Abudan kaj Lopnur najbaras al la urbo Yixun, kie garnizonis la armeo el Centra Ĉinio siatempe. Nun, tiu urbo nomiĝas Milan kaj servas ankoraŭ kiel arma kultivejo. Tie vivas Lopnur-aj maljunuloj en la aĝo de 117, 108, 101 kaj 97 jaroj. Mi havis ŝancon intervjui ilin. La 117-jara maljunulo diris al mi, ke en lia junaĝo oni kaptis fiŝojn en rivero, manĝis ilin kuiritajn aŭ rostitajn. Printempe oni kaptis sovaĝajn anasojn kaj ilin sekigis en sunradioj sur plaĝo. Poste oni kunmetis ilin en faskojn, ĉiu kun 50 sekiĝintaj anasoj, kaj konservis ilin kiel eventualan donacon por novedzino aŭ ŝanĝis ilin kontraŭ kotona teksaĵo kaj teo. La 97-jara maljunulo diris, ke li naskiĝis en Abudan-vilaĝo. Ok-jara, li ekkulturis tritikon en Milan kune kun siaj samvilaĝanoj. Post rikolto oni konservis tritikon en kelo ĉeloke. Tiuj, kiuj bezonis ĝin, venis preni ĝin. Ĝi estis komuna posedaĵo. La 101-jara maljunulo rakontis, ke antaŭ tre longe epidemio trafis Lopnur-vilaĝon. Multaj mortis de la malsano kaj la postvivantoj plejparte fuĝis al Hetian okcidente de Lopnur. Nun en la gubernio Luopu, homofono de Lopnur, loĝas Lopnur-anoj. Bedaŭrinde mi ne vidis la 108-jaran maljunulon, ĉar tiutage li iris falĉi herbojn por ŝafoj. Mi informiĝis de iu loka han-a erudiciulo, ke tiuj Lopnur-aj maljunuloj vivas pacan vivon, manĝante fiŝojn kaj kaĉon el faruno de maizo kaj fruktoj de oleastro. ■



Kadavro de antikva Loulan-ano montrata en muzeo
Foto de HAN HONG

bilon... Sciante teksu ŝtofon el ŝafa lano sed ne fari veston, ŝi sin kovris per maldelikata ŝtofo kaj ŝafa felo, kiuj ne povis rezisti kontraŭ frosto, tial ŝi pasigis vintron apud fajro, kaj ŝiaj pulmoj ricevis multe da nigra polvo.

En infanaj tomboj ekzistantaj de antaŭ trimil jaroj vidiĝas patrino amo: la infano estas ĉirkaŭvolvita per ruĝa vindo;




Kolĉenoj elterigitaj en Loulan
Foto de LIU YUSHENG



Silkaĵo elterigita en Loulan

Foto de LIU YUSHENG



Lignaj slipoj pri senakviĝo de Lopnur
Foto de LIU YUSHENG



Ĉinaj kaj japanaj ekspedicianoj survoje al Loulan

Foto de LIU YUSHENG



Ĉinaj ekspedicianoj
marŝantaj al Loulan
Foto de LIU YUSHENG

LA ĝino-a nacio kun 18 000 membroj vivas ĉefe en la Ĝino-a Distrikto kaj ties ĉirkaŭaj montregionoj de Yunnan-provinco. La nacio ne posedas sian skriban lingvon, tamen ĝi havas sian parolan lingvon, originalajn religion kaj morojn. Oni povas diri, ke ĝi estas nacio, kiu transiris unupaŝe tempon de mil jaroj en la socia evoluado.

KONGMING — SANKTULO POR ĜINOJ

Kongming, alia persona nomo de Zhuge Liang, ĉefministro de Shu-regno en la periodo de Tri Regnoj (220-280) en Ĉinio, estas rigardata kiel sinonimo de saĝo pro liaj elstaraj strategiaj manovroj. En la historio Kongming komandis armeon de Shu-regno en militiro suden al Yunnan por stabiligi la postfronton de la regno. Tial, nun cirkulas nemalmultaj anekdotoj pri Kongming. Oni aparte laŭdis, ke li enkondukis en ĝin avangardajn plugadon, arkitekturon kaj kulturon de centra Ĉinio kaj Shu-regno. Kiam la armeo estis evakuanta ĝin, la lokanoj kun larmoj adiaŭis lin. Legendo diras, ke la lokanoj el-lernis de Kongming rizkulturadon por anstataŭigi la primitivan kultivadon. Ĉe la adiaŭo ili petis de li konstruan arton. Pro lingvobaro Kongming demetis sian ĉapon por signi la adiaŭon. La lokanoj miskomprenis, ke li faris tion por montri la formon de domo, sekve ĝis nun la formo de domo de ĝinoj tre similas al la ĉapo de Kongming. Kompreneble, tio estas nur legendo, tamen ĝi spegulas la intiman rilaton inter ĝinoj kaj hanoj.

ADOLTIĜA CEREMONIO

La adoltiĝa ceremonio de ĝinoj portas evidentan unikecon. Ofte okazas, ke survoje 15-jara knabo estas "ŝtelita" de embuskantaj junuloj, kaj ĉi tiuj eskortas lin

Ĝinoj — nacio trans jarmilo

de WEI GUOXIONG



Ĝino-aj virinoj en festaj vestoj

al ceremoniejo. En la ceremonio la "ŝtelita" knabo akceptas la laborilaron donacitan de liaj gepatroj, surmetas sur sin adoltiĝan veston, anstataŭigas sian ĉapon per turbano, vestas sin per kostumo kun rondaj desegnaĵoj kaj surdorsigas koloran broditan saketon cilindran, kaj tiel li kvalifikiĝas kiel adoltulo.

Estas preskaŭ sama la adoltiĝa ceremonio de knabinoj, nur sen "ŝtelo", kaj aldoniĝas al la ceremonio kombado. Post tio ili anstataŭigas sian antaŭtukon per la subŝtofita, portas sur ŝultro koloran cilindran saketon kaj kombas la hararon en plektaĵon.

Adoltiĝa ceremonio estas turnopunkto por la kreskado de ĝino-aj gejunuloj. La gejunuloj, partoprenintaj la adoltiĝan cere-

monion, estas respektataj en diversaj aktivadoj organizitaj de samnacionoj.

SUNA FLORO — SIMBOLO DE AMO

La kostumo de ĝino-aj viroj distingiĝas per kvadrata ruĝa tolo kun brodita suna floro (*Scutellaria barbata*) en la mezo de la dorsflanko de blanka supra vesto.

La suna floro konigas belan amrakonton de ĝino-aj gejunuloj: Bela ĝino-a knabino Brulei enamigis al malriĉa knabo Zebai. Ĉe ĉiu rendevuo Zebai donacis al Brulei belan sunan floron. Poste Zebai savis Brulei el la domo de tribĉefo. En sia geedziĝa ceremonio Zebai ankoraŭ havis la sunan floron surdorse. Pasis jaroj post jaroj, kaj la suna floro, simbolo



de amo, ĉarmas kiel antaŭe.

Ĝino-aj gejunuloj elektas sian amat(in)on laŭ sia plaĉo. Geamantoj reciprokas, krom donacoj, ankaŭ kantojn en laboro. Fininte la laboron, amat(in)o metas arbofolion aŭ floron ĉe vojkruciĝon nepre irotan de la amat(in)o por difini la tempon kaj lokon por rendevuo.

BAMBUDOMO

Ĝinooj ŝatas loĝi sur montsupro. Estis duspecaj bambudomoj: Bambudomo kun fajrujo ene, loĝata de 5-6 homoj kun unu sama familia nomo; kaj rektangula bambudomo, kie loĝas homoj de plu-

amikoj en la vilaĝo alvenas por ilin gratuli. En la soleno oni ankaŭ deklamas sianacian epopeon. La aktivado kulminas per bankedo kaj oni drinkas kaj kantas la tutan nokton.

DATIE-FESTO

Datie-festo, la plej solena por ĝinooj, okazas en la lasta monato ĉiujare laŭ ĉina luna kalendaro kaj daŭras tri tagojn.

Antaŭe sur Ĝino-monto vivis tri triboj, ĉiu kun sia gepatra vilaĝo. En la lasta monato de ĉiu jaro la estro de la gepatra vilaĝo aranĝas la festan tempon laŭ agrikulturaj laboroj. Laŭ la kuti-

donacas broditan saketon al sia amato.

EN LA MODERNA TEMPO

Inter la ĉinaj nacimalplimulatoj la ĝino-a nacio estis postiĝinta en ekonomio kaj kulturo, tamen ĝi tre rapide progresis en la historia evoluo. En 1949, kiam la nova Ĉinio fondiĝis, la nacio restis ankoraŭ en la klana komunumo de la primitiva socio, la ĝinooj kultivis per fajro kaj tranĉilo kaj notis per lignogravurado. Tamen, post pli ol 40 jaroj ĝi enpaŝis en la modernan civilizacion.

En la lastaj dekelkaj jaroj la ekonomio de la ĝino-a nacio multe progresis. Ĝinooj, utiligante la lokajn klimatan kaj riĉfontan avantaĝojn, disvolvis forstokulturajn, grenajn kaj aliajn industriojn kun longiligularo (*A. longiligulare*) kaj teo kiel la ĉefaj. Ĝino-monto, kie ili loĝas, estas unu el la produktoj de *puer-teo*, fama en Yunnan. Kiel kutime, ĝinooj plene energie disvolvis kulturadon de drogherboj, kaŭĉukarboj kaj tropikaj fruktaroj kaj bredadon de brutoj. Multaj modernaj konsumaj, kiaj televido, videoaparato, fotilo kaj motorciklo, estis uzataj de ordinarnaj ĝino-aj familioj.

La ĝinooj klare scias, ke necesas bone fari edukadon, por ke la ĝino-a nacio stabile disvolviĝu. Sekve, la 44 naturaj vilaĝoj de la Ĝino-a Distrikto kolektis kapitalon por ripari kaj konstrui domojn por lernejoj, kaj nun la plej bonaj konstruaĵoj sur la monto estas tiuj de lernejoj.

Ĝino en la ĝino-a lingvo signifas "posteulo de la patrino frato". Eble ne troveblas la deveno de la nacio, nek notoj pri ĝiaj miljaraj ŝanĝiĝoj, tamen oni povas vidi en la gelernantoj la forton de la nacio por pli rapide disvolvi sin en la moderna civilizo.



Bonveniga ceremonio de ĝino-a vilaĝo

raj generacioj kun unu vira devenlinio, en kies centro estas ebena ŝtonborderita termaso kun vico da fajrujoj por malgrandaj familioj. Ambaŭflanke de la fajrujoj estas dormoĉambroj de la familioj kaj la unua ĉambro dekstre de la por-do estas destinita por la patriarko.

Ĝinooj havas eksterordinaran moron: Unu jaron post la morto de la patro la gefiloj devas konstrui domon. Kiam la domo estas finkonstruita, oni devas okazigi solenan endomiĝon.

Tiutage ĉiuj iliaj parencoj kaj

mo, la gepatra vilaĝo unue aranĝas sian festan tempon kaj poste la gefilaj vilaĝoj — la sian. La festaj tagoj ne estas la samaj en diversaj vilaĝoj, tial ĝinooj havas pli da tempo por viziti unu alian.

En la antaŭtagmezo de la unua tago de la festo okazas bovraba ceremonio. Posttagmeze oni en tamburado kolektiĝas kun vino kaj pladoj kaj kantante drinkas.

En la dua kaj tria tagoj de la festo parencoj kaj amikoj vizitas sin reciproke, kantas kaj dancas. Kaj knabinoj, kaptante la okazon,

LIBERAJ FRAŬLOJ

de YIN QIN

En Ĉinio, kvankam oni ne kontraŭas al studenta amafero, tamen ĝi ne rekomendas por la studentoj, ĉar ili bezonas multan tempon por studi, kaj plie, pri kio ili okupiĝas post diplomiĝo, tio ankoraŭ ne estas certa, tial en universitato nur malmultaj havas amat(in)ojn, kaj plejparto de la studentoj estas liberaj fraŭloj. Kiam ili eklaboras, ili renkontas multajn novajn problemojn en la socio. Juna esperantistino Yin Qin rakontis la vivon de siaj najbaraj fraŭloj. Ĉi-sube ŝi konigos al vi iliajn anekdotojn.

YU TAO

ANTAŬ du jaroj mi edziniĝis kaj atendis, ke la oficejo distribuu al ni loĝdomon. Por venki la malfacilon, ni novgeedzoj enloĝiĝis en malgranda ĉambro de apartamento, kiu apartenas al la oficejo de mia edzo. Ĝi estas duĉambra apartamento. Nia ĉambro areis 12 kvadratajn metrojn kaj la alia 15 kvadratajn metrojn. En ĉi tiu loĝas kvar fraŭloj.

Post diplomiĝo ili venis el diversaj urboj al Pekino kaj komencis labori en la projekta instituto.

LAŬVICA PREPARO DE MANĜO

Oni diras, ke sufiĉas por fraŭlo zorgi sin mem, ĉar se li satas, la tuta familio satas. Tamen, por fraŭloj prepari manĝon estas malfacile. Matene ili ellitiĝas malfrue, lavas al si la vizaĝon rapide kaj hastas al la oficejo, iam eĉ ne reordiginte la lit-kovrilon.

Survoje iuj el ili aĉetas simplan manĝaĵon, aliaj eĉ nenion manĝas. Ili havas tagmanĝon en manĝejo de la oficejo. Vespere ili volas manĝi ion bongustan, tamen prepari vespermanĝon estas malfacile por ili, ĉar ili devas mem prepari ĝin. En la apartamento estas kuirejo kun gaso. Kompare kun aliaj loĝejoj por fraŭloj, tia kondiĉo estas bona. Tamen, kiam ĉiu manĝas aparte, li sentas troan solecon. Tial ili decidis kune prepari kaj kune preni manĝon. En du grupoj ili laŭvice preparas manĝon kaj la deĵorantoj aĉetas legomojn kaj faras preparadon. Kiam la manĝo estas preta, ili kvarope ĝuas ĝin, trinkante bieron kaj parolante pri okazintaĵoj tiutagaj, kvazaŭ familianoj. Dum festotago aŭ naskiĝtago de kiu ajn el ili, ili kune manĝas en restoracio por celebri ĝin. Kiam ili sentas malĝojon, ili vizitas ankaŭ restoracion por forpeli sian malĝojon per

drinkado. Ili opinias, ke renkontiĝo estas fortuno, tial ili zorgas unu alian.

AMATA KNABINO EDZINIĜIS AL ALIA VIRO

En la instituto viroj pli multas ol virinoj, tial estas nature, ke bela knabino estas ŝatata de pluraj fraŭloj.

Lastjare eklaboris en ĝi knabino, ĉarma kaj delikata, kaj ŝia rido sonis bele. Nemalmultaj fraŭloj ekŝatis ŝin kaj Xiao Zhan estis unu el ili.

Ŝia oficeja ĉambro estas najbara al tiu de mia edzo, kaj ĉi tiu havas multe da ŝancoj kontakti ŝin. Xiao Zhan ofte demandis mian edzon pri ŝi, de kie ŝi venis, el kiu universitato ŝi diplomiĝis ktp. Mia edzo eksciis lian intencion kaj demandis, ĉu li bezonas svaton, kaj Xiao Zhan kapneis kompreneme.

Iutage, reveninte el la oficejo, silentema Xiao Zhan estis en bona humoro kaj multe babilis. Fine li diris, ke li vizitis la oficejan ĉambron de la knabino pro laboro kaj konatiĝis kun ŝi. Vidante lian ĝojan mienon, ĉiuj kuraĝigis lin tuj ekagi por svatiĝi pri ŝi, li kapjese esprimis sian firman volon.

Nemalmultaj fraŭloj interesiĝis pri la knabino kaj ofte telefonis al ŝi. Vizaĝe al la situacio, ni donis al Xiao Zhan multe da konsiloj por sukcesigi la aferon. Iu proponis, ke li rigardu filmon kune kun ŝi. Se la filmo ne estas interesa, ili ambaŭ do babilu. Dimanĉe Xiao Zhan bele sin vestis kaj ĝojplene iris al ŝi.

Post nelonge li deprimite revenis kaj senvorte ekkuŝis sur la lito. Demandite li diris, ke la knabino jam havis rendezuon. Iu diris, ke eble la knabino pretekstis tion, sed Xiao Zhan diris, ke la knabino estas ŝatata de fraŭlo Cui.

Ĉiuj kun malespero konsolis Xiao Zhan kaj kuraĝigis lin konkuri kun Cui por akiri ŝin. Xiao Zhan hezitis pri tio.

Poste la knabino edziniĝis al Cui. Ni kaj Xiao Zhan partoprenis la nupton.

Nun li havas ĉarman amatinon. Kiam ni menciis la knabinon, li diris, ke la pasintaĵo estas rememorinda.

LUKRI ESTAS MALFACILE

Iuj junuloj ŝatas veston kun fama marko kaj sportadon en sporthalo. Dum festotagoj ili aĉetas multe da bongustaj manĝaĵoj por siaj gepatroj. Por ĉio ĉi necesas granda elspezo. La instituto estas entrepreno de ŝtata posedo. Ĝiaj laborantoj estas malalte salajrataj, tial en la fino de monato ofte mankas mono al la junuloj. Por bonigi ekonomian situacion, ili faras desegnon en libera tempo. Sed post 8-hora taglaboro ili de-

segnas lacaj vespere. Ili ŝerce diris, ke ili jam fariĝis lukrantaj maŝinoj.

En 1996 multaj ĉinoj akciiis kaj riĉiĝis. La junuloj enviis ilin, opiniante akciadon facile profitiga. Kompare kun tio, desegnado per komputilo estas tre peniga. Ili do decidis akcii. Tamen por akciado necesas malfermi konton kun 50 mil juanoj. Por la junuloj tio estis astronomia cifero. Ili decidis pagi por akciado en nomo de sia kolektivo.

Komence ili gajnis monon ĉiutage kaj aĉetis pli multe da akcioj. Tamen ĉio ŝanĝiĝis kaj en 1997 la merkato de akcio falis grandamplekse kaj la junuloj malvigliĝis. Ili tamen sin konsolis, ke tio ne signifas malprofiton, ĉar ili ne vendis la akciojn.

Ĉio estis refoje en bonordo. Laboro, ripozo kaj atendo pri refoja altiĝo de la merkato de akcio.

Xiao Liu foriris de la instituto al alilanda entrepreno en Pekino. Lia laboro estis streĉa kaj lia salajro kelkobliĝis. Kiam li revenis por viziti siajn malnovajn amikojn. Li diris, ke li sopiras pri la stabileco de la instituto.

EN FERIADO

Ĉiutage post laboro ili diligente lernis la anglan lingvon kaj komputikon. Tamen, en semajnofino ili volis ŝanĝi vivmanieron. Antaŭ du jaroj Ĉinio ekpraktikis sistemon de 5-taga laboro. Por refreŝigi sin en ĉiuj ferioj ili ekskursas kune kun siaj amikoj, biciklas por ekzerci la korpon, ludas kartojn, kantas, dancas kaj sportas.

Tamen en Pekino vintro estas longa, somero — mallonga. En frosta vintro oni ne volas esti eksterdome, ankaŭ la junuloj ne estas escepto. Tial, ili prenas dormon kiel sian plej grandan ĝuon. Sabate ili dormas ĝis la 12-a, kaj post ellitiĝo ili diskutas, kion ili manĝos. Iam ni invitas ilin manĝi kune kun ni. Ni ofte sentas, ke nia loĝado multe ĝenas ilin.

Kelkfoje mi konigis al ili knabinojn kaj aranĝis simplan renkontiĝon inter ili. Feliĉe, iu paro geedziĝos.

De la lastaj du jaroj ni kunestas. Vivante kun ili, mi sentas, ke mi pli kaj pli juniĝas. Tamen mi esperas, ke ni havos nian propran loĝejon kaj ili vivos tute senĝene. ■



Ludo de ĉina ŝako

HUNDETO ADE

(Fabelo)

ADE estis aminda hundeto. Ĝi estis bonkora, saĝa kaj milda. La tuta familio ŝatis ĝin. Iutage onklino venis kun papago. Ŝi diris, ke la papago povas boji kiel hundo kaj ĝia voĉo estas pli bela ol tiu de Ade.

Aŭdinte tion, Ade malkontentiĝis, dum la papago ege ĝojis kaj bojis senĉese. Rigardante ĝian fieran aspekton, Ade sentis naŭzon.

La senĉesa bojado vekis kunblekadon de proksimaj hundoj. La surdiga bojado kolerigis la mastron, kiu diris: "Ade, kial vi kaj viaj amikoj tiel bojas? Tuj ĉesu!" La mastro ne rimarkis, ke la papago kaŭzis tion.

La maljuste riproĉita hundeto pli forte malŝatis la papagon. Ĝi diris al la birdo: "Foriru! Ne restu ĉi tie!" Tion dirinte, ĝi malfermis la kaĝon kaj la papago flugis for.


La papago malaperis. La onklino estis tiel malĝoja, ke ŝi manĝis nenion en la tuta tago. Oni serĉis la papagon ĉie. Pro ŝia korŝiriĝo, la tuta familio maltrankviliĝis. Ade tre bedaŭris tion. Ĝi pensis, ke ĝi devas fari ion por korekti sian eraron.

Ĝi serĉis ĉie kaj fine trovis, ke la papago staras sur arbo. Sed kion ajn la hundeto diris, la papago neniel dearbiĝis.

Fine, la hundeto havis bonan ideon.

Ĝi petis la junan mastron aĉeti alian papagon. Vidinte la samspeculon, la papago ĝoje dearbiĝis kaj eniris la kaĝon.

Vidinte la papagon, la onklino radiis de ĝojo. Kompreneble ankaŭ Ade ĝojis elkore. ■



ĈINIO

● La 13-an de novembro 1997, germana e-isto Bernhard Westerhoff kaj lia edzino vizitis e-iston Mao Zifu, kriplan poeton de la Changde-a Informa Lernejo, Hunan-provinco, kaj prelegis en la lernejo pri unuiĝo de Esperanto kaj homa spirito. La prelegon aŭskultis Jiang Zuyue, ĝenerala sekretario de la Changsha-a Esperanto-Asocio, kaj aliaj 200 e-istoj. S-ro Jiang donis parolon "Esperanto kaj ĝia rolo". 3 horojn daŭris la kunveno en varma etoso. S-ro Westerhoff respondis diversajn demandojn de aŭskultantoj. "Changde-a Ĵurnalo" raportis pri tio. (ZEFO)

BELGIO


● "Eŭro, ecoj kaj sekvoj por ĉiuj", 52 p., verkita de Marc Vanden Bempt, unua libro pri la eŭro en Esperanto, aperis en septembro 1997. Ĝi temas pri la historio de eŭropa monunuiĝo kaj ĝiaj pluaj paŝoj, la ecoj, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la eŭro, la leĝaj kaj praktikaj aspektoj, la enkondukaj kostoj kaj problemoj por privatuloj kaj kompanioj. Prezo ĉe la eldono: 7.95 NLG, rabato 1/3 ekde kvin ekzempleroj, plus sendokostoj (minimуме 2 NLG). FEL, Esperanto 2000, Rulenslaan 10, B-3020 Herent (Winksele), Belgio. (Flandra Esperanto-Ligo)

HISPANIO

● Alexandre Xavier Casanova Domingo preparas ĉialingvan antologion, kun unu teksto por ĉiu lingvo, akompanata de ĝia Esperanta traduko. La antologio havos ĉirkaŭ 3 500 tekstojn, do, ekzistas 3 500 lingvoj. Li petas al vi tekston el viaj naciaj lingvoj, kompreneble kun iliaj E-tradukoj; kaj se eble, kun iliaj fonetikaj transskriboj aŭ sonbendoj. La tekstoj povas esti tiom longaj kiom oni deziras, tamen principe li preferas tekstojn ĝis kvin paĝoj, po kvincent vortoj. Adr.: Calle de las Penuelas, numero 18, piso cuarto C., Codigo postal 28005 Madrid, Hispanio. (A. X. C. Domingo)

POLLANDO

● "Grupe" okazis de la 8-a ĝis la 11-a de novembro 1997 en Gliwice. Samtempe okazis ankaŭ kunveno de delegitoj de Pola Esperanto-Asocio. Partoprenis ĉ. 160 geesperantistoj, inkluzive de eksterlandaj gastoj. La programo konsistis el gazetara konferenco, koncerto, balo, prelego, urbovizitado, Esperantlingva Sankta Meso, teatraĵo "El Verda Biblio", kabareto "Amuzo" kaj renkontiĝo kun eksterlandaj gastoj. Oni elektis novan estraron de PEA. (Andrzej Sochacki)



Prelego dum GRUPE

ZAIRIO

● Por disvastigo de la Internacia Lingvo kaj plifirmigo de la E-movado en Afriko, s-ro Antoine Samuel Nduantoni Ngangu, honora prezidanto de Zaira E-Asocio, planas krei Zamenhofan Esperanto-Muzeon. Celoj: kolekti ĉion rilatan al E-o kaj al la historio de la esperantista movado, nome la bibliografian kolektadon; ordigi kaj klasifiki librojn, gazetojn, turismajn prospektojn kaj diversspecajn E-aĵojn: insignojn, fotojn, monerojn, flagetojn, medalojn, poŝtmarkojn ktp; krei imponan bibliotekon pri Esperanto; funkciigi E-kursojn diversnivele; instali aŭdvidan aparaton en la muzeo. Ĉiuj E-aĵoj estas bonvenaj kaj zorge kolektataj. Ili petas monhelpon de esperantistoj, kiuj volonte subtenas tiun ambician entreprenon. Sendu ĉion al s-ro Ngangu, BP 13 Luicala, Bas Conao. (Antoine Samuel Nduantoni Ngangu)

Du novaj libroj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

JARFINE de 1997 la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis “Fulmotondro” kaj “Sunleviĝo”, dramojn de la fama ĉina dramisto Cao Yu.

S-ro Cao Yu (1910-1996) ĝuis altan renomon en Ĉinio pro la supre menciitaj dramoj jam de la tridekaj jaroj de ĉi jarcento. Li naskiĝis en Tianjin, urbego sudoriente de Pekino je pli ol 100 kilometroj. Lia patrino forpasis en lia infaneco, kaj lia knabeco pasis en morno. Lia patro estis oficiro, kaj la familio estis bonhava. Sed Cao Yu malkontentis kontraŭ la sufoka atmosfero en la familio. Li ŝatis legi kaj lernis en malnovtipa privata lernejo. Krom ĉinaj klasikaj literaturaĵoj kaj dramoj, li legis ankaŭ multajn fremdlandajn romanojn kaj dramojn. Aŭtune de 1922 li eklernis en la mezlernejo Nankai de Tianjin. En tiu periodo li legis multajn literaturaĵojn verkitajn post la novkultura movado “La Kvara de Majo” kaj partoprenis en diversaj literaturaj aktivecoj de la lernejo. Li verkis poemojn, novelojn kaj eseojn. En 1929 lia patro mortis pro malsano kaj kadukiĝis la familio, ke li spertis la kapricojn de homaj interrilatoj kaj travidis la veran vizaĝon de homoj. Tio fundamentis lian verkadon. Aŭtune de 1930 li eklernis en la literatura fakultato de Qinghua-universitato en Pekino kaj diplomiĝis aŭtune de 1933.

En la somero de 1933 li finis la verkadon de la kvar-akta dramo “Fulmotondro”, kiun li ŝpinis kvin jarojn. Bakin, fama literaturisto de Ĉinio, estis multe emociita de la dramo, mem redaktis ĝin kaj publikigis ĝin en “Trimestra Literatura Revuo” en 1934.

“Fulmotondro” rakontas tragedion okazintan en iu ĉina urbo en la komenco de la kuranta jarcento. Zhou Puyuan, posedanto de minejo, delogis junan servistinon Lu Shiping kaj havis kun ŝi du filojn. Sed poste Zhou Puyuan edziĝis al fraŭlino de riĉa familio kaj elpelis Lu Shiping. Ŝi dronis en rivero kunportante sian duan filon, sed ili estis savitaj. Por vivtenado ŝi edziniĝis al Lu Gui kaj havis kun li filinon Lu Sifeng. Poste Lu Gui dungigis al la familio de Zhou Puyuan kiel ĝia intendanto kaj servigis ankaŭ sian filinon Sifeng en la familio, sen informi Lu Shiping. La unua filo de Zhou Puyuan, nomata Zhou Ping, adultis ne nur kun sia duonfratino Sifeng, sed ankaŭ kun sia juna duon-



patrino Fanyi. Finfine Sifeng informiĝis, ke Zhou Ping estas ŝia duonfrato. Kun hontego ŝi kuris el la domo kaj estis elektrofrapita en la ĝardeno. Ankaŭ Zhou Chong, la dua filo de Zhou Puyuan, estis elektrofrapita, kiam li detiris ŝin de la elektra drato. Zhou Ping sin pafmortigis kun pentono kaj hontego. Fanyi freneziĝis en malesperego. La dramo kun zorge aranĝita strukturo kaj komplika intrigo malkaŝas la krimon de la malluma socio.

En 1935 Cao Yu finis sian duan dramon “Sunleviĝo”, kiu estis publikigita en “Trimestra Literatura Revuo”, laŭpece en ĉiuj numeroj de 1936.

La dramo havas amvendistinon Chen Bailu kiel heroinon kaj surscenigas bankieron, riĉan vidvinon, paraziton, suban oficiston, studenton, malaltklasan prostituitinon, protokanajlon k.a. Ĝi malkaŝas la putriĝon kaj kadukiĝon de la malnova socio.

“Fulmotondro” kaj “Sunleviĝo”, fruperiodaj ĉefverkoj de Cao Yu, estis filmitaj kaj ofte ludataj post la publikigo. Ili havas versiojn ankaŭ en multaj aliaj lingvoj.

En sia maljuneco Cao Yu estis prezidanto de la Ĉina Dramista Asocio kaj la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj kaj membro de la ĉina societo “Amikoj de Esperanto”. ■

Ruĝdoma Songō (Volumo 3) 628 p. 15 x 21 cm. Ilus. Bind.

Prezo: 26,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

Fulmotondro 136p. 15 x 21 cm. Bind.

Prezo: 10,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

Sunleviĝo 142p. 15 x 21 cm. Bind.

Prezo: 10,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

La supraj tri libroj mendeblas ĉe Distribua Fakto de El Popola Ĉinio per la adreso: P. O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio, aŭ telefakso: +86-10-68321808.

WU JIE:

Fondinto de instituto por kripluloj

Liao Ming

EN la infaneco Liao Ming suferis de poliomyelito. Serioza atrofio trafis lin kaj lia maldekstra kruro fariĝis malpli longa ol la dekstra je tri cm. Kun firma volo kaj maltimo sur la vivovojo, li fondis la unuan instituton por kripluloj de Ĉinio.

Li neniam vizitis elementan lernejon. Kaj la kuracado multe malhelpis lian studon en mezlernejo. Por kuracado li prenis multe da medikamentoj, kio iagrade malbonigis lian memoron. Por refreŝigi la memoron ĉiutage li ekzercis sin per starado nokte kaj kuretis frumatene, malgraŭ vento kaj pluvo. Rezulte de tio, li reakiris la kapablon absorbiĝi en legado. Li soifis sciojn kaj deziris kapablon sin vivteni. Tamen en 1981 li malsukcesis en la ekzameno por eniri normalan kolezion, ĉar li ne trapasis la korpan ekzamenon. Tio frakasis lian koron, tamen ne estingiĝis lia espero pri la vivo. Kaj en li naskiĝis forta deziro fondi instituton por kripluloj.

En 1985 post ekzameno Liao Ming estis akceptita de la politika kaj jura fakultato de la Etna Instituto Zhongnan. Tie li plene disvolvis sian genion. En la in-

stituto li estis respondeculo de la studenta asocio, plurfoje organizis kaj gvidis institutan kaj interinstitutan aktivadojn kaj fariĝis ĉefviolonisto de la instituta orkestro. Dank' al sia diligenteco, li gajnis bonajn notojn kaj komencis lerni en la kvara klaso je unu lernojaranta anticipe. Unu jaron poste, li komencis lerni en la fakultato de etnologio kiel studento-esploristo. Krome, li lernis ankaŭ la ĉinan medicinon. Kaj tutjare li ekzercis la membrojn per *uŝu-o* kaj *ĉigong-o* kaj banis sin per malvarma akvo.

En 1991 li finis sian studentan vivon kaj ekinstruis en la instituto. Per sia ago li pruvis: Li povas fari tion, kion faras la sanuloj. Tamen estis malfacile imageble, ke du jarojn poste, li forlasis sian oficon kaj preparis sin por fondi instituton por kripluloj. Lia instruisto avertis, ke li ne risku sian estontecon. Sed ĉi tiu diris: "Mi dediĉos mian tutan vivon al la afero!"

Lia decido ne estis senbaza. Li sin pravigis: "Antaŭe mi faris ĉion por pruvi, ke mi estas same forta, kiel sanulo. Sed tio absolute ne estas ĉio! Sinperfektigo signifas ne nur perfektigon en la korpo, psiko kaj klereco, sed an-

kaŭ en persona bonkonduito. Mi volas helpi pli da kripluloj sin perfektigi. Kaj por atingi la celon nepre necesas edukado."

Lian decidon aprobis s-ino Hu Dabai, rektorino de Huanghe-politekniko. Kiel brulvundito, ŝi havis grandan entuziasmon por edukado de kripluloj kaj multe subtenis lin finance kaj materie. Septembre de 1996, naskiĝis en Zhengzhou, Henan-provinco, la Internacia Instituto por Kripluloj, sub la Politekniko Huanghe.

Kun instruado, konvalesko kaj scienca esplorado kiel tuto, ĝi havas fakojn de komputiko, financo, elektroniko, belarto, dekoracio, fasono, ĉina medicino, masaĝo, *ĉigong-o*, ĉina lingvo, fremdaj lingvoj, dancarto, sekretarieco, voĉmuziko kaj instrumenta muziko, konforme al la bezono de kriplulo-studentoj. Por ke ili rompu sian psikan fermitecon kaj revenu al la socio, la instituto lasis kune lerni la kriplulo-studentojn kaj studentojn de sana kresko. Samtempe kun tio, la instituto donis malsamajn korpo-ekzercajn lecionojn al la kriplulo-studentoj. Nun en la instituto estas konstruataj konvaleskejoj kaj instrua domo oportuna por ili. La konvaleska fako akceptis 40 studentojn, kiuj

LIBREJO ADMINISTRATA DE INTELEKTULOJ

Tio estas ordinara librejo nomata Wansheng. Ĝiaj mastroj estas geedzoj diplomigintaj el la Pekina Universitato. Administrata de intelektuloj, la librejo portas apartan trajton. Ĝi, kun areo de apenaŭ 50 kvadrataj metroj, sidas ĉe kvieta strateto. Al ĝi rigardas la Pekina Universitato kaj la strato antaŭ ĝi kondukas al Qinghua-universitato. Tial, ĝiaj ĉefaj klientoj estas instruistoj kaj studentoj de la menciitaj universitatoj.

En la librejo troviĝas diversaj libroj. Tie oni povas ne nur aĉeti librojn ŝatatajn, sed ankaŭ legi dum tuta tago. Iu frekventanto diris: "Wansheng ne nur vendas librojn, sed ankaŭ estas ideala loko por legado."

Por tio, la mastroj preferas provizi la klientojn per bonkvalitaj kaj enhavoriĉaj libroj ol gajni pli da mono. Tie la libroj, ĉu pri literaturo kaj historio, ĉu pri filozofio kaj arto, ĉiuj estis elektitaj inter tiuj eldonitaj de grandaj eldonejoj de Ĉinio. La librejo allogas multajn klientojn, precipe intelektulojn, per libroj multspecaj kun altaj akademia kaj konserva valoroj. Krome, la librejo ankaŭ donacas katalogon al siaj libro-amikoj de diversaj lokoj de la lando por faciligi al ili poŝte aĉeti librojn. La mastroj funkciigas ankaŭ bibliotekon, por ke la vizitantoj legu sen aĉeti librojn. En la librejo okazas neregula kultura kun-

sido...

La loĝejo de la mastroj troviĝas ne malproksime de la librejo. Ĝi aspektas malgranda, ĉar ĝi plenas ofte de libroj nove aĉetitaj. Oni vidas, ke ilia vivo estas signifplena.

AMBULATORIO EN APOTEKO

En Huarentang, malnova pekina apoteko, laboras pli ol 20 famaj ĉin-medicinaj fakuloj, kiuj plejparte estas emeritoj de grandaj hospitaloj.

Fakte, en multaj apotekoj laboras veteranaj ĉin-medicinaj kuracistoj, ankaŭ Tongrentang, alia malnova apoteko en Pekino, ne estas escepto. Sed en ordinara apoteko servas nur 1-2 tiaj kuracistoj, kiuj, sidante ĉe

tablo en angulo de la apoteko, palpas pulson de malsanuloj, pridemanas ilin kaj preskribas al ili medikamentojn. Multaj malsanuloj vizitas la malnovajn apotekojn pro famo de iliaj veteranaj ĉin-medicinaj kuracistoj kaj sekve la apotekoj renomiĝas pli vaste. Nun la ĉin-medicinaj kuracistoj de Huarentang laboras en kvieta ambulatorio. Veteranaj ĉin-medicinaj kuracistoj diagnozas malsanon dum interparolo kun malsanulo.

Kompreneble, malsanuloj devas iri al hospitalo por kompleta aŭ granda ekzameno aŭ por operacio.

Multaj apotekoj servas al klientoj ankaŭ per dekotado de drogherboj.



Konsultiĝo de ĉinmedicina kuracisto en apoteko

okupiĝos pri instruado kaj scienca esplorado post diplomitiĝo.

La instituto akceptas tiujn kriplulojn, kiuj sukcesas en la tutlanda ekzameno por altlernejo, kaj la limigo de enira aĝo por ili estas iom malpli severa ol tiu por aliaj partoprenintoj. Kiam iu 30-

jarulo de kamparana familio ricevis avizon pri la akceptiĝo, li diris kun emocio: "Mi fariĝis la unua studento de mia familio dum pluraj generacioj!" Por solvi la financan malfacilaĵon de studentoj la instituto donis al ili ŝancon lerni je kosto de sia propra lukrado

en libertempo. La supre menciita studento pagis por lernado el la enspezo de sia postleciona laboro en la manĝejo de la instituto.

Iniciatite de Liao Ming, fondiĝis la societo Domo de Kripluloj, kies tasko estas doni konsi-

TRANSLOKADO DE ŜTONKAVERNO

En la akvokonservejo de la Hidraŭlika Konstruaĵo Xiaolangdi de la Flava Rivero estis Xiwo-ŝtonkaverno, unika antikva konstruaĵo de la dinastio Norda Wei (386-534) ĉe de la Flava Rivero. En ĝi bone konserviĝis reliefoj de kvar pagoj, tri niĉoj kaj 288 statuoj. Kiel historiaj restaĵoj la ŝtonaj gravuraĵoj kaj statuoj lerte faritaj kaj bone strukturitaj havas altan valoron de arto. La ŝtonkaverno estis konstruita sur kruta monto, kaj sub ĝi torenitis la Flava Rivero.

En 1995 komenciĝis konstruado de la Hidraŭlika Konstruaĵo Xiaolangdi de la Flava Rivero. Por savi tiun valoran kulturan heredaĵon, la departemento pri ĉinaj historiaj restaĵoj decidis, post esplorado de fakuloj, transloki la ŝtonkavernon en sekuran lokon. Oni dividis la pagodojn, niĉojn kaj statuojn en ok grupojn, hakis ilin laŭ tuto aŭ parto tavolo post tavolo kaj laŭvice translokis ilin al muzeo proksime.

Post pli-ol-sep-monata penado oni sukcesis konservi la originan aspekton de tiuj historiaj restaĵoj. Nun tiu pli-ol-1400-jara ŝtonkaverno adiaŭis sian naskiĝlokon, translokiĝis en proksiman muzeon kaj evitis engluton de akvo.

Translokado de ŝtonkaverno estas senprecedenca en la

ĉina historio. La sukcesa translokado estas ekzemplo por la venonta laboro savi kaj protekti historiajn restaĵojn.

REAPERO DE FRESKOJ DE LA JARCENTO

Por restarigi la funkcion de la financa strato laŭlonge de la okcidenta bordo de Huangpu-rivero en Ŝanhajo, oni reordigis en la lastaj jaroj la servon de iuj domegoj ĉe la strato. Tie la urbodomo origine estis domego de la Hongkong-a kaj Ŝanhaja Banko-Korporacio en Ŝanhajo, konstruita en 1923. Nun la Pudong-a Disvolva Banko de Ŝanhajo kontraŭ pago akiris 50-jaran uzrajton. Por ke ĝia aspekto respondu al la aktuala rolo, la banko, antaŭ ol ĝin ripari, postulis ĝiajn historiajn materialojn de koncernatoj en- kaj eksterlandaj. Neatendite, ĝi akiris de rilataj fakuloj de brita kaj ŝanhaja konstru-projektaj institutoj po unu saman skizon de freskoj sur la plafono de la domego. Sed la freskoj estis kovritaj de dika tavolo da flava farbo.

Fakuloj diris, ke tiuj freskoj estis faritaj de italaj metiartistoj en 1923. Ili troviĝas sur la okangula plafono de la vestiblo pli ol 20 m alta de la domego kaj areas entute pli ol 200 kvadratajn metrojn. Ok el tiuj 33 freskoj prezentas la aspekton de Ŝanhajo, Hongkong, Londono, Parizo, Nov-Jorko, Tokio, Bankoko kaj Kalikato en la komenco de

la kuranta jarcento kun homfiguroj el mitoj. La fresko pri Ŝanhajo montras la pejzaĝon de la laŭborda strato kun la domego de la Hongkong-a kaj Ŝanhaja Banko-Korporacio en Ŝanhajo, unika konstruaĵo ĉe la strato. Aliaj 24 freskoj montras bestojn en mitoj. La cetra estas granda fresko pri mito. Tiuj freskoj konsistas el kelkcent mil koloraj mozaikaj pecoj el Venecio, Italio. Post forigo de flava farbo, la freskoj ĉarmas denove per siaj brilaj koloroj kaj vivsimilaj homfiguroj.

Reapero de plafonaj freskoj vekis grandan atenton de ŝanhajanoj. Samtempe kun taksono de la arta valoro de la freskoj, oni turnas la rigardon al ĉ. aliaj 30 domegoj ĉe la strato. Fakuloj diris, ke sur la plafono de la vestiblo de la dogana domego konstruita en 1927 troviĝas ankaŭ fresko konsistanta el koloraj mozaikaj pecoj. Ĝi temas pri marnavigado. Krome, en la domego de la Hongkong-a kaj Ŝanhaja Banko-Korporacio en Ŝanhajo ankaŭ staras kvar kolonoj 13 m altaj el itala marmoro.


Oni konjektis, ke en la konstruaĵaro ĉe la strato eble estas pli da historiaj freskoj. Sekve de reapero de la ĉarmo kaj eleganteco de tiuj konstruaĵoj, malkovriĝos la mistera vualo de pli multe da historiaj restaĵoj de la jarcento.

lojn kaj kuracmanieron al kripluloj kaj donaci monon al ili. Knabino Yan Hong perdis okulon en akcidento. Ekde tiam ŝi izolitis sin de la ekstera mondo. Informiĝinte pri tio, li letere konsolis ŝin multfoje kaj ŝi sendis al li sian poemaron. Li

aranĝis deklamadon de tiuj poemoj en la Domo de Kripluloj kaj sendis koncernan sonbendon al ŝi, kaj ĉi tiu diris en sia letero: "Mi multe ĝuas alies zorgon kaj komprenon. Nun mi havas la kuraĝon esti inter multaj homoj."

"Mi volas helpi tiom da homoj, kiom mi povas," diris Liao Ming. La unua tia instituto estas funkciigata por kripluloj de Ĉinio, tamen la afero por kripluloj, grava parto de la homa civilizacio, ne konas landlimon. ■

- 1 Han Yuling kaj junaj geinstruistoj
- 2 Orkestro de la lernejo
- 3 Han Yuling en japana elementa lernejo
- 4 Fonetika leciono de la lernejo



Lernejestrino

Han Yuling

Fotoj de LI CHANGJIE



Instruistoj de elementa lernejo estas tre ordinaraj en la okuloj de multaj homoj, tamen ilia laboro estas tre grava. Instruistino Han Yuling estas vaste atentata pro siaj atingoj en instruado.

En 1978 ŝi fariĝis estrino de la Naŭa Elementa Lernejo de Haikou sur Hainan-insulo. Tiam pro financa malfacilo la klasĉambroj kaj ekipaĵoj estis nesufiĉaj, kaj la instruistoj kun malalta salajro kaj negranda loĝejo ne tre diligente laboris. Por ŝanĝi tiun staton, Han petis de pli ol cent entreprenoj kvar milionojn da juanoj kaj per tiom da mono konstruigis en kvin jaroj grandan lernejan domon, sporthalon kaj kvar loĝdomojn por la instruistoj. Ankaŭ la ekipaĵoj multiĝis.

Krom la administrado de la lernejo, Han sin okupas ankaŭ pri studado de eduka teorio. Ŝi verkas artikolojn pri edukado. De 1982 la lernantoj de ŝia lernejo sukcesis en diversaj ekzamenoj kaj gajnis premiojn en konkursoj pri verkado kadre de la urbo kaj la lando.

La nomo de Han enskribiĝis en la libron "Eminentaj Edukistoj de Nuntempa Ĉinio".



Filino de la tero

SUR la tero, kie vivas la homaro, ni ĉinoj flegas la Ter-vilaĝon kun areo de 9 600 000 kvadrataj kilometroj. Se ĉiu agas favore al la medi-protekto, do la tero, nia patrino, povos vivi pli longe,” diris Liao Xiaoyi (Ljaŭ Ŝjaŭji), direktoro de la Medi-kultura Centro de la Ter-vilaĝo.

Antaŭ dek jaroj Liao Xiaoyi laboris kiel redaktoro en redakcio. Tiam ŝi opiniis, ke la malfacilaj problemoj, kiaj media poluado kaj manko de energio, solviĝos kun la disvolviĝo de sciencoj kaj teknikoj, sen zorgado de la homoj. Poste, iu artikolo pri medi-protekto kortuŝis ŝin. La artikolo diras, ke la media kvalito de iuj landoj estas kompare bona, ĉar la popoloj de tiuj landoj ĝenerale havas bonan konscion pri la media krizo; dum tiu de aliaj landoj, inkl. de Ĉinio, estas malpli bona, kaj ĝenerale iliaj popolanoj ne konscias tion. Liao Xiaoyi vidis, ke al tiuj popolanoj mankas media konscio, ĉar ili havas malaltan edukitecon pri medio. De tiam ŝi legis kvanton da medi-protektaj dokumentoj kaj okupiĝis pri media edukado, forlasinte sian postenon de redaktoro.

Poste, ŝi flugis al Usono, kie ŝi mempage lernis kiel vizit-studentino en la internacia medipolitika fakto de universitato. Tie ŝi intervjuis pli ol 40 medi-pro-

tektajn aktivulinojn el diversaj landoj kaj faris televidan filmon pri virinoj kaj medi-protektado sub la titolo “Filinoj de la Tero”. En NRO-forumo de la Kvara Monda Virina Konferenco de UN ĝi estis projekciita kaj laŭdata de la rigardantoj el diversaj landoj. Tamen oni ne sciis, ke por pagi al la filmisto 900 usonajn dolarojn ĉiutage, ŝi laboris kiel purigisti-

nepre necesas ilin protekti. Tial Liao Xiaoyi ekhavis la ideon starigi popolan medi-protektan organizon. Sekve, ŝi komencis la novan laboron. Tage ŝi klopodis por registro, akiro de monrimedoj kaj luo de oficejo; nokte ŝi kun sia filino kaj ties vartistino loĝis ĉe sia amikino. Tio estis malgranda ĉambro entenanta nur dulokan liton, kaj altastatura Liao Xiaoyi devis dormi en la lito kun kurbiĝintaj gamboj. Tiam, kiom ŝi deziris havi sian propran ĉambron!

La Ter-vilaĝo fondiĝis. La kvin aliĝintoj ĉiuj estis virinoj. Ĉu hazarde? El la antikvaj ĉinaj mitoj estas “Nüwa flikas la ĉielon”, kiu rakontas, ke Nüwa kreis la homojn kaj ankaŭ la universo. Kiam aperis truon sur la ĉielo, Nüwa peneme flikis kaj fine ŝtopis la ĉielon per sia korpo. Jen kunfandiĝis ŝi kun la ĉielo.

Ĉinaj prapatroj elektis virinon kiel heroinon de flikado de la ĉielo, ĉu tio estas la sankta devo de virinoj? Liao Xiaoyi rememoris pasintaĵon: Kiam ŝia filino estis dujara, ŝi ofte parolis kun la proksima poplo. Poste ĝi estis hakfaligita kaj la filino ploris la tutan nokton. Liao Xiaoyi konsciis, ke eble naski kaj kulturisiajn idojn estas sankta devo por la virinoj kaj pro tio ili pli profunde zorgas pri la medio, kiu strikte rilatas al la sano de la homaro kaj al la vivo de la posteuloj.

“Tempo jam venis, ni amu la



Liao Xiaoyi (maldekstre) eksplikanta al pasantoj la signifon de reaĉeto de uzitaj piloj

no kaj mastrumistino; ŝia edzo, ne ripozante en ĉiuj ferioj, servis kiel ŝiaj ŝoforo, reĝisoro kaj transportisto.

Reveninte al la patrolando, ŝi vidis, ke multaj viv-manieroj malfavore al la medio pli kaj pli poluas ĝin kaj, multaj moroj forlasitaj de aliaj landoj furoras ankoraŭ en Ĉinio. Ŝi volus averti, ke Ĉinio havas vastan teritorion kaj abundon da riĉfontoj, tamen la kvanto de ĝia pokapa riĉfonto estas tre malgranda kaj



Liao Xiaoyi (maldekstre) intervjuas la prezidanton de la Monda Komisiono pri Medio kaj Disvolviĝo.

teron.

Ĝi donas al ni la vivon, kiel nia ĝardeno.

Purigu la maron kaj aeron, savu la arbarojn.

...

Se la mondo estas vilaĝo, ni havos komunan estontecon.

Tempo estas antaŭ ni, kaj mi ekagu de mi; tempo urĝas, kaj ni ne plu hezitu.

Aŭskultu batadon de la horloĝo, kaj tempo jam venis."

La monde fama kanto de medi-protekto "Tempo jam venis" longe ŝvebis tra la Forumo de Medi-protekto por Raportistinoj starigita de la Ter-vilaĝo. Agu tuj! Helpate de la raportistinoj, la Ter-vilaĝo lanĉis medi-protektan rubrikon en dekelkaj gazetoj kaj ĵurnaloj, kiuj havas grandan eldonkvanton. La Centra Televido, plej granda en Ĉinio, telesendas en la difinita tempo ĉiusemajne la specialan programon "Medi-protekta Horo" por la vilaĝo, cele havigi medi-protektan konscion al ĉiuj ordinaraj ĉinoj. Liao Xiaoyi ripetade emfazis la rilatojn inter virinoj kaj medi-protekto. Ŝi diris, ke la virinoj konsistigas 60% de la konsumantoj, kaj tiu konsum-proporcio multe influas la virojn kaj infanojn. Sekve, la virinoj portas sur si ĉefan respondecon en

la vivo kaj konsumado. La Ter-vilaĝo proponas ŝpari energion, repreni utiligeblajn forĵetaĵojn, aĉeti produktojn malmulte poluantajn, ne uzi plastajn manĝilojn kaj saketojn, ne mortigi sovaĝajn bestojn ktp.

En 1996 en iuj kvartaloj de Pekino aperis plastaj rubujoj kun la vortoj por eluzitaj plastajĵoj, vitraĵoj, paperoj kaj piloj respektive. Videblis tiaj plastaj saketoj ankaŭ en la kuirejoj de loĝantoj. De tiam la loĝantoj bonorde aranĝas la rubon aparte laŭ speco. Iu dommastrino diris: "De la Ter-vilaĝo mi sciiĝis, ke oni povas fari la bonorde aranĝitan rubon utila por la vivo, ekz. produkti senplumban benzinon el eluzitaj plastajĵoj, bonkvalitan paperon el eluzita papero..."

Pasis jam du jaroj. La Ter-vilaĝo helpis al nemalmultaj havi vivmanieron favore al medi-protekto. Kaj Liao Xiaoyi ankoraŭ laboras en la "vilaĝo" kun areo de dekelkaj kvadrataj metroj. Ŝi diris, ke nun en Ĉinio pli ol 3 mil homoj aliĝis al la reto de la verdaj volontuloj de la Ter-vilaĝo. Ŝi esperas, ke ĉiuj konscios, ke protekti la teron estas ilia sankta devo. ■

Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ruĝdoma Songô (en tri volumoj) aperis

"Ruĝdoma Songô" estas unu el la plej famaj klasikaj romanoj de Ĉinio, kiu priskribas la ruiniĝon de iu nobela familio en la lasta periodo de la ĉina feŭda socio kaj la tragedion de juna amanta paro. La romano prezentas la dekadencan de la ĉina feŭda socio kaj ĝiajn diversajn konfliktojn.

La romano estas vaste konata en Ĉinio, kiel verkoj de L. Tolstoj en Rusio kaj dramoj de Ŝekspiro en Britio. La Esperanta versio de "Ruĝdoma Songô" estas en tri volumoj.

La prezoj por tri volumoj respektive:

22.00 USD + 5.00 USD
(sendokosto)

28.00 USD + 5.00 USD
(sendokosto)

26.00 USD + 5.00 USD
(sendokosto)

Mendu ĉe:

- Distribua Fako de EPC
- Libro servo de UEA
- Nia peranto en via lando

La Paco-kompanio (Ĉinio) por konsultiĝo pri internacia afero

Servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj:

Importo kaj eksporto de komercaĵoj;


Laboro en Ĉinio; internacia geedziĝo.

Adr.: Direktoro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230001, He-fei, Ĉinio.

Tel/Fax: +86-551-2632545; -4484606

Ret-poŝto: cnhflib@public.hf.ah.cn.

Pri medicinaj manĝaĵoj



Medicina manĝaĵo el glueca rizo, ternuksa kerno, jujuboj kaj aliaj kvin materialoj

LA ĉinaj medicinaj manĝaĵoj estas bongustaj, bonodoraj, okulplaĉaj kaj tonikaj. Ili, efikaj por preventi kaj kuraci malsanojn, estas tre ŝatataj en Ĉinio.

Antaŭ 3 000 jaroj en Ĉinio jam aperis tiaj manĝaĵoj. En Zhou-dinastio (1066-256 a.K.) la medicina departemento de la kortego havis 4 fakojn, el kiuj unu estis pri medicinaj manĝaĵoj, speciale pri la manĝaĵoj de la reĝa familio. La medicinaj manĝaĵoj estas ne nur bongustaj, sed ankaŭ facile prepareblaj, kaj plie, ili havas neniun malutilon, tial dum miloj da jaroj ili estis alte taksataj de la ĉina medicinista rondo, kiu faris senĉesan esploron pri ili. Laŭ statistiko, en la antikva Ĉinio oni kreis pli ol 300 verkojn pri manĝaĵa tonikado kun abundaj receptoj. El ĉi tiuj la palacaj estis luksaj, dum la popolaj— simplaj, facile prepareblaj. Hodiaŭ la medicinaj manĝaĵoj estas pli multe ŝatataj kaj en urboj troviĝas restoracioj de tiaj

manĝaĵoj kaj multaj popolanoj mem preparas ilin.

Laboranto en restoracio de medicinaj manĝaĵoj konigis, ke iuj klientoj venis ĉi tien por gustumado, kaj aliaj por kuracado. Li diris ankaŭ, ke la medicinaj manĝaĵoj estas efikaj kaj por kuracado kaj por tonikado. Por ke la manĝaĵoj estu bongustaj sen malbona efiko, oni devas elekti drogojn kun kuracaj funkcioj kaj ne preni amarajn nek malbongustajn drogojn en la preparado. Oni diris al mi, ke la “Feliĉiga kaj Vivolongiga Festeno” de la restoracio estas tre ŝatata en Singapuro. Por kiel eble plej multe feliĉigi la popolanojn, oni devas popularigi la preparadon de la familiaj medicinaj manĝaĵoj inter la ordinaraĵoj loĝantoj. Nutradistino Gu Kuiqin, kiu longtempe sin okupis pri konsultiĝo pri familiaj medicinaj manĝaĵoj, diris al mi, ke preno de la medicinaj manĝaĵoj estas unu el la terapioj laŭ la ĉin-medicina teorio. La ĉinaj

medicinistoj opinias, ke ĉiu manĝaĵo kaj ĉiu ĉina medikamento havas siajn proprajn karakterizaĵojn, kiuj estas utilaj por forigi perturbiĝon de la homaj visceroj, ekz. la manĝaĵoj kaj drogoj por mildigi kaj elimini pirozon kaj aliajn varmajn simptomojn certe estas efikaj por malvarmigo, kiel ekzemple, radiato (*Phaseolus radiatus*), kukumo, lufo kaj isata radiko, tial oni devas kuraci laŭ la sanstato kaj simptomoj de la malsanuloj per konvenaj medicinaj manĝaĵoj. Tio ja estas la esenco de la tradicia ĉina manĝaĵ-terapio. Ekz. por kuraci tusadon oni devas alpreni malsamajn metodojn. Se oni tudas pro malvarmumo oni devas preni kaĉon el rizo kaj ŝenopraza tigo, dum la malsanulo, kiu tudas pro pulma brulumo, devas preni kaĉon el lilibulbo kaj rizo. S-ino Gu emfazis, ke se oni preparas konvenan medicinan manĝaĵon laŭ sia sanstato en la ĉiutaga vivo, oni do trovos taŭgan vojon por sanprotektado kaj vivolongigo. Tio estas pli grava por beboj, gravedulinoj, maljunuloj kaj alergiuloj, kiuj devas esti limigitaj per medikamento-dozo. Al la facile lacigeblaj homoj estas tre utila la tonika, bongusta kaj refreŝiga supo el 10 g da blanka orefungo, 30 g da lotussemoj kaj 1 500 mililitroj da kokaĵa supo. Se oni estas hazarde atakita de malvarmumo, oni do povas boligi 500 g da akvo kun 15 g da zingibro, konvena kvanto da ŝenopraza tigo kaj 20 g da bruna sukero kaj trinki la dekoktaĵon, dum ĝi estas varma. Tiu dekoktaĵo estas utila por ŝvitado kaj mildigo de malvarmumo. Oni devas aparte atenti, ke la konsisto kaj dozo de medicina manĝaĵo devas esti preparataj strikte laŭ la ĉin-medicina preskribo. Se oni malobservas tion, do la farita manĝaĵo aŭ malutilas aŭ ne efikas al la sanstato de la malsanuloj. Fine mi devas diri, ke prenante la medicinan manĝaĵon, oni ne devas rifuzi alian terapion. ■

Longmen-ŝtonkavernaro



Longmen-ŝtonkavernaro estas unu el la tri famaj ŝtonkavernaroj en Ĉinio. Ĝi situas en Longmen- kaj Xiangshan-montoj sude de Luoyang, Henan-provinco. Ĝia konstruado komenciĝis en la jaro 493 kaj daŭris en la postaj dinastioj, kaj nun estas pli ol 2 100 niĉoj kun pli ol cent mil statuoj. Ĝi estas la plej granda trezorejo de ŝtonaj skulptaĵoj kun plej riĉa literaturo.

La poŝtmarkoserio kun 4 pecoj kaj miniatura filatelaĵo estis emisiitaj de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko en 1993.



Suprenirantaj ombroj
de MOJTABA
KHEIRKHAH (Irano)



Sen titolo
de MOJTABA
KHEIRKHAH
(Irano)

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九八年第四期

(本刊代号：二一九一五) 国内统一刊号：CN11-1339/G2